

Num ankau en ePub formato!



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Novembro 2018 n-ro: 35



Merhaba,

Bu sonbahar sayımızda sizlere gene çok sayıda okunacak yazılar seçtik ama özellikle okumanız gereken yazılardan bazıları:

- * La 412-a sektoro
- * La mortigo de Talo
- * Hindua Mito: La Buterigado de la Oceano de Lakto
- * La plej senutiliga kaj plej romantika renkonto
- * Lina kaj la Donaco
- * vs

Yazıların orijini ve hazırlayanların ülkeleri ise inanılamayacak kadar çeşitli, sadece bu sayıda :

Fransa, Yunanistan, Almanya, Bulgaristan, Türkiye, Arnavutluk, Litvanya, ABD, Hindistan, İtalya, Uruguay, Danimarka, İngiltere, Brezilya, Ukrayna, Avustralya, Macaristan, Çekya, vd...

Hepinize iyi okumalar !

Saluton,

En ĉi tiu printempa numero de nia revueto ni elektis multajn tekstojn por via legado. Jen kelkaj tre gravaj tekstoj inter ili:

- * La 412-a sektoro
- * La mortigo de Talo
- * Hindua Mito: La Buterigado de la Oceano de Lakto
- * La plej senutiliga kaj plej romantika renkonto
- * Lina kaj la Donaco
- * ktp

La nombro de landoj de la origino kaj de la pretigistoj estas nekredinde diversa. Nur en ĉi tiu numero :

Francujo, Grekujo, Germanujo, Bulgario, Turkujo, Albanujo, Litovio, Usono, Barato, Italujo, Urugvajo, Danujo, Britujo, Brazilo, Ukrainio, Aŭstralio, Hungario, Ĉeĥio, ka...

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI

www.CDELI.org

RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Nova Kurso en Gresillon	2
Kial mi lernis Esperanton	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
La 2-a junulara renkontiĝo en Kreto	4
Duonhoroj donis perspektivon pri la librorikolto	5
Demokrito: Pri la plezuro vivi	6
Fajra spirito de Bogomil Ĵivkov, Bulgario	7
Ebligi kontraŭ Permesi	7
DIOSKUROJ (ΔΙΟΣΚΟΥΡΟΙ)	6
La 412-a sektoro	10
La mortigo de Talo	11
El la libro de "Dao de Jing" (27)	13
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 6)	14
EKRA 2018	15
La Teorio Nakamura	15
Ŝercoj	16
Kurcvortenigmo	16
UEA Estraro	16
Mallonga Historio de Filozofio (34)	17
La bestoj de la stultulo	18
Hindua Mito: La Buterigado de la Oceano de Lakto	19
La pajla giganto	20
La plej senutiliga kaj plej romantika renkonto	21
Esperanto en Usona filmo	22
La ĉambro	22
Danĝerego de la nuklea centralo Tomari	23
Ovo de Kolumbo	25
Floro (1)	26
Idealaj Ĝardenoj	27
La salamandro kiu neniam iĝas plenkreska	28
Lina kaj la Donaco	30
Ponto super la rivero	31
La legendo pri la Ratkaptisto	31
Facilaj rakontoj	32
La 12-a MONA Kunveno	32
Solvo de la Krucvortenigmo	32

Kursoj



Nuntempe okazas nur unu kurso en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul kun 9 lernantoj kaj kies gvidanto estas Murat Özdizdar.

<https://edukado.net/kursejo?kid=26934>

Nova kurso en Gresillon



Kurso bazita je Unesko-kuriero en Gresillon

Konegata, tutmonda aktivulo Dennis Keefe prezentas de la 27-a de oktobro ĝis la 4-a de novembro 2018 kurson por progresantaj parolantoj de Esperanto en la franca Kastelo Gresillon. Rigardu pri ĝi en <http://gresillon.org/spip.php?rubrique36&lang=eo#K3>

La kurso estas aparta, ĉar ĝi utiligas artikolojn de la versio en Esperanto de la kuriero de Unesko, do, materialo por plenkreskuloj pri mondaj nuntempaj problemoj laŭ valoroj similaj al tiuj de esperantistoj.

Dennis esperas, ke tiaj kursoj okazos ĉie tra Eŭropo post iom da tempo. Valoras ĉeesti la unuan el tiuj kursoj.

tejo

“Mi lernis Esperanton pro pigreco. Mi ne volis lerni fremdajn lingvojn kaj Esperanto malkovrigis al mi, ke mi fakte kapablas lerni. De tiam mi eklernis kelkajn fremdajn lingvojn, kiujn mi uzas kun relativa sukceso.”

—JAMES REZENDE PITON

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Fakkunsidoj de la sumoo en la 103a UK en Lisbono

Mi intencis havi nur unu kunsidon pri tiu temo, sed Clay (Konstanta kongresa sekretario) proponis, ke mi havu plurajn, kaj laŭ lia konsilo mi havis du kunsidojn: la unuan en dimanĉo post la Ina?guro kaj la duan en vendredo, antaŭtago de la Fermo, kaj dum tiuj 6 tagoj ni havis Lisbonan Konkurson de Sumoo. En la unua kunsido partoprenis 60 homoj, kaj el tiuj aliĝis 40 homoj al la sumoo. Preskaŭ ĉiuj estas partoprenantoj kaj partoprenintoj de la sumoo, do en la salono estis tre amika sento. En vendredo mi disdonis "diplomon" al ĉiuj kaj kune fotis. Ĉiuj laŭdis la projekton de la sumoo kaj promesis pli kaj plu varbi partoprenontojn.

Hori Jasuo

Aperis rezultoj de la Septembra Esperanto-Sumoo 2018!

<http://www.esperanto-sumoo.pl/images/septembro2018.pdf>

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>
Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

UEA



N-ro 757 (2018-09-20) Vikipedio en Esperanto atingas sian 250-milan artikolon

La 18-an de Septembro 2018 Vikipedio en Esperanto atingis sian 250-milan artikolon. [...]

N-ro 758 (2018-09-27)

Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Monda Turisma Tago

La 27-a de septembro estis deklarita Monda Turisma Tago de UN – tago en kiu ĉiujare oni observas la signifon de turismo kiel rimedo por renkontigi homojn trans regionaj kaj [...]

N-ro 759 (2018-09-30)

Internacia Tago de Tradukado: pledoj de UEA ĉe UN pri valorigo de lingva diverseco

En 2017 la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj aprobis vere signifan rezolucion rilate la uzadon de lingvoj en tiu organizaĵo. Tiu rezolucio estis direktita al tradukado. [...]

N-ro 761 (2018-10-05)

La 104-a UK: informkanaloj, reta aliĝilo kaj LKK #LAHTIO2019

La 104-a Universala Kongreso de Esperanto (20-27 de julio 2019) okazos en la [...]

N-ro 762 (2018-10-23)

Maia, Gobbo kaj de Kock en la novembra Malferma Tago

La stabo de la Centra Oficejo kaj la estraro de UEA invitas vizitantojn al la dua Malferma Tago de 2018, kiu okazos jam la 49-an fojon, sabaton, la 17-an de novembro, en la sidejo de UEA ĉe Nieuwe Binnenweg 176 en Roterdamo. [...]

TEJO



Ekkonu la Estraron de TEJO 2018-2019!

Hoan Tran – Ĝojo (Vjetnamio) – Prezidanto
Léon Kamenický (Slovakio) – Unua Vicprezidanto
Francesco Maurelli (Usono) – Dua Vicprezidanto
Konstanze Schönfeld – Tuška (Germanio) – Ĝenerala Sekretario
Mung Bui – Feliĉa (Vjetnamio) – Kasisto
Hans Becklin – Hanso (Usono) – Estrarano
Arturo Crespo (Kolombio) – Estrarano
Kingslim Edah (Benino) – Estrarano
Olga Sevcenco (Moldavio) – Estrarano [...]

IJK 2020 en via lando!

Kandidatiĝu kaj organizu kune kun TEJO la 76-an Internacian Junularan Kongreson en via lando!
Por ke kandidatoj sentu sin pli certaj kaj kuraĝaj ni proponas du etapojn por sendi al ni viajn proponojn. Kial ni faras tiel? Ĉar ni rimarkis ke kelkfoje vi bezonas pli da helpo pri viaj kandidatiĝoj. [...]

Estu parto de la Elekta Komisiono de TEJO!

La Elekta Komisiono estas Organo de TEJO, kies ekzisto kaj funkcio estas priskribita de la Reglamente pri Elektro de Estraranoj. Ĝia tasko estas kolekti kandidatiĝojn por la estraro (kaj ankaŭ mem alparoli eblajn kandidatojn), prijuĝi la kandidatojn kaj prezenti al la komitato strukturitan proponon por elekto de nova estraro. [...]



Leterojn ni ricevis el geamikoj



Kara, mi ĝojas, ke via revuo estas tre diversa. Ne mankas movadaj informoj, historio, filozofio, mitologio, scienco, poezio, gramatiko, instru-ludoj, humuraĵoj, romanoj kaj anekdotoj. Bonan daŭrigadon !

Ginette Martin, el Francio



Elkoran dankon pro ĉiam pli interesa, enhavoriĉa, universala revuo via. Gratulojn! Mi bone komprenas ke ĉio estas volontula laboro via, sed tre utila por esperantistaro kiu soifas ekscii pri Turkio eŭropeca. Mi tuj transsendas la revuon al Adil Olluri kaj aliaj miaj amikoj ĉi tie. Ĝis.

Bardhyl Selimi, el Albanio



Estimata, Bonvolu sendi la "Turkan Stelon" al mia retadreso, se tio eblas. Multan antaŭdankon. Mi deziras al vi daŭran energion, ĝojon kaj sukceson je la eldonado de via valora kaj interesa gazeto. Samideane kaj sincere,

Harald Schmitz, el Germanio



Mi trovis kelkajn artikolojn pri Esperanto si-mem en ĉi-tiu numero (Turka Stelo septembro 2018). Mi opinias, ke daŭrigo lerni Esperanton estas grava, kompreneble se vi povas. Rezultoj aŭ profitoj estos malfacile gajnititaj. Mi pensas, ke teni celo(j)n aŭ rezono(j)n por lerni ĝin estos ŝlosilo. Sed la vojo sur kiu Esperantistoj iros estos ne-pavimita aŭ ne-rekta, mi antaŭvidas.

Hidemaru, el Japanio

(el la recenzoj de la septembra 2018 Sumoo)



Koran dankon kaj varmajn gratulojn, kara!

Maria Nazare Laroça, el Brazilo

La 2-a Junulara Renkontiĝo en Kreto

Ni decidis vojaĝi kiam ni aŭdis pri ĉi tiu evento en Kreto.

Ni planadis nian vojaĝon. Laŭ la plano, mi iris al Ayvalık, poste al Mythilini.

Sarper havas amikino en Mytillini. Kiam ni alvenis, ni vojaĝis en la insulo. Ni vidis geedziĝan ceremonion kaj unu grandan preĝejon. Poste, ni atendis nian ŝipon al Ateno ĝis noktomezo. Sed bedaŭrinde, la ŝipo estis malfrua. Tial ni estis malfrue en Ateno por ŝipo por Kreto.

Feliĉe, ili decidis ŝanĝi niajn biletojn por ĉi tiam punkto. Do, ni havis tempon por esplori Atenon. Ni piediris en Ateno. En punkto, ni komencis nian vojaĝon al Kreto.

En mateno, ni renkontiĝis kun Annie kaj Thomas. Thomas estas el Hungario. Li vizitis Kreton kiel ni. Annie vivas en Neapoli, do ni renkontiĝis en Neapoli.

La domo estis bela kaj malgranda. Ni ŝatis la domon rapide.

La unuan tagon, ni ripozis iomete. Poste, ni decidis iri al Sankta Nikolao. Sankta Nikolao estas la tria plej granda urbo en Kreto kaj la plej proksima. Ĝi havas bonan plaĝon. Ni naĝis multe tie.

La duan tagon, ni piediris al ĝardeno de Annie kaj piediris ĉirkaŭ Neapoli. Ni vizitis fabrikon por oleo de olivo kaj lernis kiel homoj faras olivoelon el historio ĝis hodiaŭ.

La trian tagon, Annie diris ke unu esperanto en Kreto babilis kun ŝi kaj volas renkontiĝi kun ni. Angelos ne vivas en Kreto sed en Belgio. Li loĝis en hotelo en Kreto, en Malia. Mi kuiris turkan pladon kaj

kiam li alvenis, ni vespermanĝis kune. . Li intivis nin al ilia hotelo en Malia. Do ni decidis iri al Malia en la venonta tago.

En Malia, ni naĝis, parolis kaj manĝis multe. Angelos povas paroli Esperanto bonege. Li parolis pri politiko, Turkio, manĝaĵoj, Grekio, ĉion... Poste ni dankis lin kaj lian edzinon kaj reveturis al Neapoli.

Poste, sekvantan tagon mi kaj Sarper decidis liri motorciklon. Ni luis ĝin kaj veturis multe tie.

verkis **Sarper Yeniçeri**, el Turkujo

kunlabore kun **Begüm Urgancı**, el Turkujo

La junularan renkontigon organizas ĉiu somere **Annie Grente** el Grekujo : anniegrente@hotmail.fr



en la bildo : Sarper Yeniçeri, Annie Grente, Thomas, Angelos Tsirimokos, Begüm Urgancı

Kio plej plaĉis al vi en la programo de la Universala Kongreso de Lisbono? Tiu estas unu el la demandoj en formularo sendita de UEA al la partoprenantoj de la kongreso. La aŭtoraj duonhoroj, respondas Carlo Minnaja.



En la Lisbona libroservo.

Mia aŭdkapablo rimarkinde malboniĝis, do malgraŭ la sendube efika laŭtparolila aparataro en la diversaj ĉambroj mi rezignis pri prelegoj, kiujn mi tre verŝajne povos legi en posta papera eldonaĵo. Mi estas ankoraŭ zeloto de la presita paĝo, poŝtelefonoj prezentas al mi literojn tro malgrandajn por trankvila kaj nelaciga legado.

Male, mi spektis preskaŭ ĉiujn aŭtorajn duonhorojn, en kiuj oni parolas vid-al-vide kun la personoj, povas komenti rekte iliajn dirojn, ne nur ilin aŭskulti; la ejo por tio estis perfekte aranĝita en balkono super la libroservo, kun kelkdeko da seĝoj plene sufiĉaj por aŭskultantoj ne bezonantaj laŭtparolilojn. La sube aranĝita tablaro de la libroservo ne aspektis riĉpropona kiel kutime, eble tial ke la organizo laŭ temoj (lernolibroj, antologioj, literaturo k.a.) kaŭzis, ke iuj tabloj estis duone malplenaj.

Se menciis nur kelkajn aŭtorajn duonhorojn, plej plaĉis al mi la prezento de Javier Alcalde kaj José María Salguero pri Antaŭ unu jarcento, kiu aspektis al mi originalaĵo, malgraŭ ke aperis pri la unua mondmilito centoj kaj centoj da memorverkoj. La kunmeto de la eroj ŝajnis al mi bone konstruita, kun la aŭtora modesteco, ke multo mankas, sed la aŭtoroj prezentis la verkon kiel ankoraŭ nefermitan kaj petis pri aldonoj, kiuj konsistigu kompletigon aŭ eĉ duan volumon.

Esperantistoj estas diverslandaj kaj, kutime, respektaj al alilandanoj, do kolekto de iliaj leteroj, agadoj, verkoj donis la garantion, ke ne estos nur tradukoj de naciismaj vidpunktoj, kiuj tamen necesis por kompreni kial Eŭropo eniris tunelon kondukantan

al tiom enorma katastrofo.

Dum la minutoj kun parolrajtoj de la ĉeestantoj mi havis okazon rimarkigi, ke tiu kolekto estas manka je du gravaj detaloj: la traktado de la suda milit-fronto kaj la sinteno de la katolikoj. Eble ĉiu membro de la Entento atribuas al sia lando la meriton meti finon al la konflikto, sed sendube la venko de Italio kontraŭ Aŭstrio-Hungario en la batalo de Vittorio Veneto estis grava ero en la kapitulaco de la Centreŭropaj Imperioj. Tiurilate mi estis afable invitita al aldonoj.

Pri la kunmetintoj de ĉi tiu valora antologio, se licas strikte persona opinio, Alcalde ŝajnas al mi nova stelo kun malofta vasta kompetenteco kaj ekvilibra juĝkapablo ankaŭ pri temoj, kie la pasio estas nature grava komponanto.

Flankateme, la iberia roto, dum jardekoj prestiĝe ĉeesta en la Akademio de Esperanto sed nun ne plu post la demisio de la sola restinto Miguel Gutiérrez, povus denove reformiĝi en la lingva institucio kun la enveno de Alcalde, Miguel Fernández kaj la reveno de Gonçalo Neves, siatempe maloportune nekonfirmata post nur trijara deĵoro (sed la kaŭzo de tio devas esti serĉata en la kampo de simpatioj kaj mal- inter akademianoj, ne ja ĉe lingva kompetenteco).

Antaŭ unu jarcento montris ankaŭ revigliĝon de la eldona fako de SAT, kiu produktis ĉi-jare ankaŭ la poemaron Rev-ene (vidu sekvajn liniojn) kaj la tradukon (fare de la aŭtoro de ĉi tiu artikolo) de Anarkio, ĉefa teksto pri tiu socia teorio verkita de la italo Errico Malatesta.

Miguel Fernández atutis per prezento de du grandaj verkoj: la traduko kaj komento de Tagoj kaj ruinoj de Jaume Grau Casas, iama vicprezidanto de la Akademio, transfuĝinto al Francio dum la enlanda hispana milito, kaj la poemaro Rev-ene, tute freŝa fakte "reveno" en la poezian arenon post pli ol dekjara silento.

La unua rakontas pri la aventuroj de tiuj rifuĝintoj, akceptataj kontraŭvole sed malamataj de la gastiganta lando, en kiu ili estis transloĝigataj de unu koncentrejo al alia; en la dua esprimiĝas kaj la forta kondamno de la nuna egoisma kapitalisma socio kaj la amo al ĉio bela kio ankoraŭ restas en la mondo, en la personoj, en la amikoj. Temas pri kantoj, la vortoj konformas al muziko en originalaj tonaloj, kiel plor' maĵora, aŭ am' diesa maĵora: ja Fernández estas tenoro en grupo.

Same kantis ĉe sia aŭtoro duonhoro Mikaelo Bronŝtejn, akompanate de gitaro; bedaŭrinde preskaŭ neniu konis liajn versojn publikigitajn delonge en liaj verkoj kaj diskoj, tial apenaŭ kreiĝis voĉa akompano fare de la publiko, kiu kreus plaĉan koruson en

atmosfera jam dekomence agrablighita per biskvitoj kaj vodko. Bronŝtejn havis siaflanke, kun la bardo Sergeo la Terura el Latvio, plenplenan salonon ĉe pli ampleksa koncerto.

Christer Kiselman redaktas la revuon Esperantologio – Esperanto Studies. La ĉefa manko de ĉi tiu revuo estas, ke ĝi aperas sen fiksa ritmo: inter unu numero kaj la posta pasas jaroj (la lasta aperis en 2015), tiel ke abonado apenaŭ sencas; unuopaj numeroj estas ja altnivelaj, sed ili preskaŭ perdiĝas en la oceano de la diverstipaj eldonoj, kaj ankaŭ ilia eldonejo Kava-Pech ne havas tiel fortajn informkanalojn.

Tial, preskaŭ kiel numero de la revuo, aperis sub ĉefredaktado de Kiselman Aliroj al Esperanto, fakte longe atendata plenumiĝo de projekto startinta antaŭ kelke da jaroj. Kiselman ĝin prezentis kiel memstaran verkon, antologion kunigantan eseojn de dek kvin aŭtoroj, inter la plej elstaraj esperantologoj (ok estas akademianoj).

Kiel kaj kial personoj aliras nian lingvon? Ĉiu eseinto interpretas iun allogon de Esperanto, en kiu leganto povas trovi sin mem. Se menciis nur tri, mi trovis aparte elstarajn tiujn de Javier Alcalde, de Giorgio Silfer kaj de Humphrey Tonkin: ĉiuj startas de analizo de dokumentoj. Alcalde rakontas pri la pacisma aliro, kun la pluraj klopodoj kandidatigi Zamenhofon al la Nobel-pacpremio, kaj pri la fakte sennombraj esperantistoj kiuj agadis partoprenante en la institucioj kiuj ja la premion ricevis; la bibliografio estas elĉerpa.

Silfer ekzegezas du leterojn de Zamenhof, origine ruslingvaj, kiuj pritraktas la internan ideon de esperantismo kiel integriĝon en homaranismon kaj

devenigas el tio identecon de la Esperanta popolo, temo ofte pridebatata ankaŭ ekster la bazo de objektiva pritakso. Tonkin per sia historia aliro fakte resumas la tutan evoluon de la Esperanto-movado, alvenante ĝis la polemikoj diversfontaj pri ĉefaj verkoj freŝe aperintaj kun ekvilibra juĝo pri ilia konsisto.

Spomenka Ŝtimec havas precizan ideon pri sia partopreno en la beletra kampo: la kroata literaturo povas same bone flosi kaj progresi eĉ sen ŝiaj verkoj, sed ŝia verkado en Esperanto havas ian utilon, ĉar ĝi alportas voĉon, kiun aliaj ne alportas. La renkontoj de verkistoj en ŝia bieno en Kroatio estas utilaj en medio kiu ne havas konstantajn kaj regulajn eblojn de kontaktado.

Ŝia lasta sukceso estas la italigo, fare de la aŭtoro de ĉi tiu artikolo kaj Giulio Cappa, de Ombroj sur interna pejzaĝo, ŝia romano de 1984, kiu estos prezentita en Padovo post kelke da semajnoj, ĉe fama libroeldona evento.

Suso Moinhos estis kunresponsulo de la bone kaj belbilde redaktata kongresa bulteno Taĵo nia, tial li ofte estis enfermita en la redaktejo. En lia aŭtora duonhoru la publiko konatiĝis kun lia debuta poemaro Laminarioj, kiu jam ricevis brile analizan recenzon en Literatura Foiro; samrevue aperis recenzo de lia majstra traduko de Memoraĵoj de kampara knabo en la serio "Oriento-Okcidento".

Estis ankaŭ aliaj aŭtoraj duonhoruj, inter kiuj la mia. Pri ili eventuale raportos aliulo.

Carlo Minnaja

Fonto: <https://www.liberafolio.org/2018/08/17/duonhoruj-donis-perspektivon-pri-la-librorikolto/>

Demokrito: Pri la plezuro vivi

Malsaĝulo vivas sen ĝojo pri la vivo.

La malica, senkomprenema, malvirta kaj nesankta vivo ne estas malbona vivo, sed longe daŭra mortado.

Tiu, kiu bonfarte sentas sin pelata al justa kaj laŭleĝa vivo, estas tage kaj nokte gaja kaj forta kaj senafliktata, sed al tiu, kiu neglektas la justecon kaj ne faras tion, kio necesas, fariĝas ĉio tre malĝojiga, kiam li rememoras pri io el tio, kaj li timas kaj torturas sin mem.


Malsaĝuloj estas tiuj, kiuj malamas la vivon kaj tamen volas vivi, ĉar ili timas la Hadeson.

Malsaĝuloj sopiras la vivon, ĉar ili timas la morton.

Malsaĝuloj volas fariĝi maljunaj, ĉar ili timas la morton.

Kelkaj homoj, kiuj scias nenion pri la dissolviĝo de

tradukis Hans-Georg Kaiser, el Germanio



la homa naturo, sed vivas konscia pri sia malbona agado, penas elpensi dum sia tuta vivo mensogitajn fablojn pri la tempo kaj la fino.

Homoj, kiuj fuĝas de la morto, postkuras ĝin.

Spiritulo estas tiu, kiu kutimiĝas pri tio ĉerpi mem la

ĝojojn.

De dioj inspire agas tiu, kiu ĉiam elpensas ion belan.

La grandajn ĝojojn kaŭzas la rigardado de belaj verkoj.

De la plezuroj, ĝojigas tio, kio plej raras, plej multe.

Vivo sen festaj solenaĵoj estas longa vojo sen gastejoj.

Neniun ĝuon oni permesu al si, se ĝi estas malsaniga.

Nelaŭtempaj ĝuoj estigas malĝuojn.

tradukis **Hans-Georg Kaiser**, el Germanio el la eseo "Etoso de la malstreĉiteco" de la malnovgreka filozofo Demokrito.

La eseo estas trovita en la libro:
David Dilmaghani kaj Nassima Sahraoui:
"Malgranda filozofio de la pigrado"

Fonto: <https://cezartradukoj.blogspot.com/2018/04/demokrito-pri-la-plezuro-vivi-el-eseo.html>

Fajra spirito de Bogomil Ĵivkov, Bulgario

verkis Elena Popova, el Bulgario

Jen Prometeo,
kun aglo surshultre. Pek' ? –
ŝtelis la fajron.

Bonkora Titan'
vane koleris l' diojn.
Mankas egalec' .

Eva kun pomo –
ne elpagita kulpo.
Ĉiam' sen ino?

Muzika eĥo
je Rodopa Montaro –
Orfea memor' .

Falas folioj
el la Arbo de vivo.
Printempo venos.

L' milit' finiĝis
kun lambastonoj. Antaŭ
li – malluma nokt'.

La amo portas
flugilojn nur al duo.
Arda pasio.

Varma tero sub
nuda Eva. Ĉielo
emociiĝas.

Danc' de la korpoj –
muziko, ekstazo kaj...
forĝesita nokt' .

Spirit' kaj korpo –
la materio venkas.
L'Spirit' suferas.

Patrin' kaj ido –
sankta, ĉiama ligo.
Ĉiela faro.

Nokta ripozo –
kapo ĉe kapo sonĝe.
La zorgoj dormas.

Li kaj Ŝi en voj'
al lumanta espero.
Proksime kruco.

Birdo kaj ino
impetaj al la lumo.
Suna invito.

Muziko sonas –
sinforges' ĉe piano.
Luno aŭskultas.



Bogomil estas skulptisto el Sofio, Bulgario

Ebligi kontraŭ Permesi

Ne konfuzu ebligi kaj permesi
ebligi = doni kondiĉojn, por ke io estu ebla
(doni fizikan eblon)

permesi = konsenti, ke iu libere faru ion (doni moralan eblon, doni rajton)

Tro ofte oni vidas malbonan uzon de la verbo

"permesi". Ekzemple:

"La pluvo permesas kreskadon de plantoj";

sed la plantoj ne bezonas moralan permeson por kreski. Oni devas diri

"La pluvo ebligas kreskadon de plantoj" aŭ:

"La pluvo ebligas la plantojn kreski"

gramatikaĵo el Ginette Martin, el Francio

Permesi estas alia afero: Jen ĝi en la ĝusta uzo:

"La patrino permesas la ludojn de infanoj ekstere.

La patrino permesas la infanojn ludi ekstere /

La patrino permesas al la infanoj ludi ekstere."

Sed:

"La bona vetero ebligas la ludojn de la infanoj ekstere.

La bona vetero ebligas la infanojn ludi ekstere /

La bona vetero ebligas al la infanoj ludi ekstere."



Antaŭ kelkaj monatoj mi spektis televidan informprogramon, kiu prezentis virinon, se mi bone memoras Anglinon, ĵus naskintan ĝemelajn filojn. La unu bebo estis blankhaŭta kaj la dua nigra, malgraŭ tio, ke la edzo de la virino estas blankulo. La espliko estis donita post esploro de fakuloj kaj post la konfeso de la patrino, ke li estis samtempe, aŭ preskaŭ samtempe, sekskuniĝinta kun du viroj, kun sia blanka edzo kaj kun sia nigra amoranto!



Ŝoka, neordinara afero, kiu naskis la demandon “ĉu virino povas naski ĝemelojn elvenintajn el du patroj?”.

Mi certe antaŭsciis la respondon, mi bone scias, ke tio estas ebla, kaj post longa intertraktado de fakuloj tion certigis ankaŭ la sciencista eldiro “jes, tio povas okazi!”. Kompreneble mi ne estas specialisto pri tiaj aferoj, tamen mi estis tute certa pri la verdikto de la scienculoj, simple ĉar mi scias la historion de Dioskuroj.

Iam, reĝo de Sparto (Σπάρτη), la potenca ĉefurbo de Lakonujo (Λακωνία), estis Tindareo (Τυνδάρεως), glora, diskonata kaj respektinda en la tuta helena lando heroo. Tindareo, kiam iĝis reĝo, enamiĝis al la tre juna kaj belega reĝidino de Etolio (Αιτωλία), Leda (Λήδα) kaj li edziĝis kun ŝi. La reĝa paro vivis feliĉe kaj akiris sep infanojn, kvin filinojn kaj du ĝemelajn filojn. Supozeble Afrodita (Αφροδίτη), la diino de la amo ne tute simpatiis Tindareon; nur tiele mi povas ekspliki tion, ke el la kvin liaj filinoj, la tri, Filonoa (Φιλονόη), Helena (Ελένη) kaj Klitemnestra (Κλυταιμνήστρα), ĉiuj reĝinoj de grandaj landoj, iĝis la plej konataj en la tuta Helenujo (Ελλάς), vere fatalaj adultintinoj, kaj kaŭzis terurajn malfeliĉaĵojn, tamen tio ĉi estas temo de alia rakontado.

Pro siaj du filoj, Tindareo estis, tute prave, fiera, ĉar ili estis je ĉio bonaj kaj amindaj, same kiel ilia patro bravaj, kuraĝaj, heroaj, sed ankaŭ tre bonkoraj, kompatemaj kaj sindonemaj. Tiuj du filoj de Tindareo estis Kastoro (Κάστωρ) kaj Polideŭko aŭ Polukso (Πολυδεύκης), ĉie kaj por ĉiam konataj kiel Dioskuroj, alnomo signifanta Zeŭsidoj, filoj de Zeŭso (Ζεὺς).

Kial, do, la filoj de Tindareo estis tiele nomataj? La afero estas neordinara, sufiĉe komplika, do ĝi

bezonas eksplikon.

Estas jam konata tio, ke la plej granda dio, la reĝo de la tuta mondo, Zeŭso estis eksterordinare virinama. La homoj diris, ke lia seksimpulso kaj seksardo egalas al tiu de mil junaj kaj fortaj viroj. La granda dio ne rezistis al sia emo sekskuniĝi kun ĉiu dezirata virino, li eĉ ne hezitis uzi diversajn artifikojn por kontentigi sian tre oftan amoran pasion. Multaj kredis, ke li faris tion, ĉar, per sia ekzemplo, li deziris montri al la viroj, dioj kaj homoj, kia estas ilia ĉefa devo kaj deca konduto rilate al la amoraĵoj; kaj li faris tion ĉar li deziris kaj celis la plimultiĝon de la homaro. Aliaj kredis ke Zeŭso simple kontentigis la peton de sia amata filino, Afrodita, kiu deziris ke la viroj estu kiel eble plej seksaktivaj, por kontentigi la virinojn kaj plekti kiel eble plej multajn amhistoriojn.

Ĉu pro tio, ĉu pro io alia, la fakto estas, ke Zeŭso enamiĝis al la pli multaj belaj virinoj. Mi jam diris, ke Leda estis belega, do ŝi ne povus eviti la subitan amoron de la dio. Tamen, Zeŭso amis kaj respektis la heroan Tindareon, do, li ne volis rekte alproksimiĝi al lia edzino, sed, ĉar li ne povis bridi sian pasion, li alprenis la formon de cigno, li trompis Ledan kaj iamaniere kuniĝis kun ŝi. Tute hazarde, post nur kelkaj momentoj, Tindareo vizitis la liton de sia edzino kaj sekskuniĝis kun ŝi. Tiele, tiun nokton Leda koncipis de du viroj siajn ĝemelajn, Polideŭkon, la filon de Zeŭso, kaj Kastoron, la filon de Tindareo. Malgraŭ tio, ke nur la unu el la ĝemeloj estis filo de Zeŭso, ambaŭ fratoj ricevis la alnomon Dioskuroj.

La du fratoj estis tute egale edukitaj kaj amitaj de iliaj gepatroj kaj ili estis kunligitaj inter si per eksterordinara sindediĉo kaj amo, oni diris, ke ili vivis per unu animo en du koproj.

Tute krome, mi aldonu, ke ankaŭ la plej juna filino de Tindareo, Helena, estis filino de Zeŭso. mi ne scias ĉu ankaŭ ŝi estis koncipita la saman tagon aŭ la dio vizitis ankoraŭfoje Ledan, tamen tio ne interesan nin ĉi tie.

Mi jam diris, ke la du fratoj ĝuadis tute egale la amon kaj prizorgon de siaj gepatroj, kaj, kiel reĝidoj kaj filoj de renoma heroo, ekde sia frua juneco estis perfekte ekzercitaj en la uzo de la armiloj kaj la ceteraj viraj okupiĝoj kaj ili estis aparte amataj de ĉiuj Spartanoj. Kastoro, kiu povis dresi eĉ la plej sovaĝajn ĉevalojn, estis eksterordinare lerta ĉarkondukisto, nevenkebla en la ĉarkuradajn konkursojn kiujn li ŝatis partopreni. De sia flanko, Polideŭko estis tre bona kaj forta, nevenkebla boksisto.





Dioskuroj, kompreneble, partoprenis la grandan militekspedicion de la Argonaŭtoj (Αργοναῦται), de la plej grandaj herooj el la tuta Greklando, al Kolĉido (Κολχίς). Ili distingiĝis per sia kuraĝo kaj militlerteco en multaj bataloj, tamen plej notinda estas la venko de Polideŭko super Amiko (Αμύκας).

Oni diradis ke tiu Amiko estis la elpensinto de la boksarto. Li estis reĝo de la Bebrikoj (Βέβρυκες) ĉe Propontiso (Προποντίς), kaj filo de Pozidono (Ποσειδών), la dio de la maro. Li estis viro tre fiera, tre altastatura kaj forta, kiu malpermesis al la fremduloj la transiron de sia teritorio, krom se iu el ili povus konkuri kontraŭ li kaj lin venki en boksbatolo. La terura, kompreneble nevenkebla, Amiko, ne nur senindulge batadis tiun, kiu kuraĝis kontraŭstari al li, sed, post sia venko, li ne nur malpermesis la transiron, sed li ankaŭ sklavigis la venkiton.

Kiam la Argonaŭtoj atingis la landon de la Bebrikoj, Amiko provokis ilin kaj tiam Polideŭko elvoikis lin al boksduelo. Sekvis forta kaj longa interbatado kaj fine, tiu kiu falis surteren estis Amiko. Polideŭko ligis lin sur arbo kaj li lasis lin libera nur kiam la venkita reĝo donis sian parolon, ke li neniam plu ripetos sian malprudentan taktikon.

Kiam Tezeo (Θησεύς), la granda heroo, fondinto kaj reĝo de la potenca Ateno (Αθήναι), forrabis la belegan Helenan, fratino de Dioskuroj, tiuj lastaj ne hezitis, kun armeo surprize atakis Atikon (Αττική), ili invadis la regionon Afidnoj (Αφιδναί), kie estis gardata la forrabita junulino, ili tute venkis la rezistantojn kaj ili ne nur elliberigis sian fratino, sed ili kapris kaj forprenis kun si ankaŭ Etran (Αίθρα), la patrino de Tezeo, kiu, ekde tiam, de reĝpatrino iĝis servistino de Helena.

Estis multaj la militaj sed ankaŭ la pacaj atingoj kaj sukcesoj de Dioskuroj, kiuj iĝis pli kaj pli amataj al la popolo de Lakonujo.

Reĝo de la najbara Mesinio (Μεσσηνία) estis la frato de Tindareo, Afareo (Αφαρεύς), kiu havis du filojn, Ligeon (Λυγκεύς) kaj Idason (Ιθάς). Tiuj, kuzoj de Dioskuroj, estis same lertaj, fortaj, kuraĝaj kaj riskemaj viroj, kaj ili posedis povojn neordinarajn, eĉ superhomajn. Idaso, viro kun giganta aspekto, estis ege lerta kaj forta militisto kaj nevenkebla el la lancjetado. Ligeo posedis supernature akran vidadon, li povis tute klare ekvidi ĉion ajn de tre malproksima

distanco, ankaŭ se tio estis lokita malantaŭ ĉia ajn vidobstaklo.

La kvar kuzoj tre ofte kune sin distris, ĉasadis kaj batalis kontraŭ komunaj kontraŭuloj aŭ malamikoj; tamen, ŝajnas ke iam disigis ilin amafero, ia amrivaleco. Temis pri Feba (Φοίβη) kaj Ilaira (Ιλάειρα), kiujn Dioskuroj verŝajne amis aŭ nur deziris, sed kiujn oni fianĉinigas kun la du kuzoj de Dioskuroj.

Iam, do, la kvar junuloj kune agresis regionon de la malamika Arkadio (Αρκαδία) kaj foririnte ili rabprenis grandan gregon da bovoj. La disdonadon de la rabaĵo faris Idaso, kiu, trompinte Dioskurojn, donis al ili tre malgrandan parton. Dioskuroj, kiuj pensis ankaŭ pri la du perditaj junulinoj, ekkoleris, kaj ne akceptinte la ofendon, atakis nokte Mesinion kaj ili ne nur prenis la tutan bovgregon sed ili forrabis ankaŭ la fianĉinojn de siaj kuzoj.

Sekvis persekutado, dum kiu Dioskuroj, celante fari embuskon al siaj persekutantojn, sin kaŝis en granda trunkokavo. Ili forgesis, ke Ligeo povis vidi ĉion kaŝitan, do, ekzakte tio okazis, Ligeo ilin lokalizis kaj Idaso ĵetis sian lanĉon, kiu trapasis la arbotrunkon kaj la kaŝitan Kastoron. Vidinte tion, Polideŭko, en stato freneza, furioze sin ĵetis kontraŭ la kontraŭulojn, per nur unu glavobato li mortigis Ligeon kaj komencis kruele batali kontraŭ la terura, enorma Idaso. Unu momenton tiu lasta levis grandegan ŝtonon kaj ĝin ĵetis kontraŭ Polideŭko. Kiam Dioskuro, akceptinte tian fortegan baton, stumblis kaj falis, intervenis Zeŭso, kiu, ĵetinte fulmon forbruligis Idason kaj savis sian filon. Tamen, Polideŭko, estis jam perdinta sian mondon, li povis vidi nenion alian, krom sia mortinta frato, li brakumis lian kadavron kaj kiel frenezulo komencis ekkrii kaj korŝire lamentadi. Li petegadis per nereteneblaj larmoj Zeŭson, doni ankaŭ al li la morton, por ke li iru kun sia frato al la suba mondo. Li petegadis sian patron igi lin mortema por ke li povu akompani sian fraton.

Zeŭso, kortuŝite sin prezentis al sia filo kaj diris al



li, ke li povas elekti inter du ebloj, ĉu iri, kiel senmortulo, al Elizeo (Ἠλύσια Πεδία) por ĝui la eternan feliĉon de la dioj, aŭ esti kun sia frato, unu tagon en Hadeso (Ἅδης) kun la mortintoj kaj unu tagon en Elizeo kun la senmortuloj.

Polideuko akceptis la duan eblon, li, do, donacis la duonon de sia senmorteco al sia amata frato. Tiele, Dioskuroj vivas ĉiam kune en stato de duonsenmorteco.

La homoj, unue en Lakonujo kaj pli poste en multaj ankoraŭ teritorioj de Greklando, igis la amindajn heroojn dioj, ili fondis por ili sanktejojn kaj templojn, en

La 412-a sektoro

li estis kvar personoj en ŝvelboato sur la trankvilaj kaj mallumaj marakvojn en Egeo, lumigitaj per plenlumo. Du adoleskantoj, du infanoj, du inoj du viroj. Antaŭ mallonga tempo ili nevole forlasis siajn domojn, kiuj troviĝis en unu el la randaj kvartaloj de Alepo. Ilia nura deziro nun estis atingi Eŭropon kaj establi novan vivon por si.



Antaŭ unu monato kiam ili alvenis al Smirno el Gaziantep, ili vidis la maron por la unua fojo. Tiam, tiu grandioza blueco mirigis ilin. Sed ili nun, kun remiloj enmane kaj en malnova ŝvelboato, provis trapasi la Egean maron. Ĉifoje la vasta senfina mallumo ilin timigis. La boato kiu daŭre moviĝis supren kaj suben estis flosiranta malrapide. La lumoj de la kontraŭa marbordo jam videblis. Tiuj lumoj kiuj palpebrumis al ili signis novan vivon, ian veran homecan vivon.

La infanoj lace pro remado estis ripozantaj. Hasan estis la unua, kiu rimarkis, ke io ne estis bona en la boato:

“Ve patrino! Eniras akvo en la boaton. Rigardu ĉie estas akvo...”

La du virinoj haltis la remadon. Fatma, la patrino de Hasan palpis per siaj manoj la plankon de la boato. Sur la planko estis konsiderinda kvanto da akvo.

“Ne timu mia filo, akvo ne eniras en la boaton... Tiu akvo... Tiu akvo eniris la boaton pro la frapantaj ondoj sur ĝi. Nun vi kaj via kuzo haltigu la remadon. Mi donas al vi alian taskon. Per tiuj siteloj vi provu forĵeti

kiuj ili adoris ilin kiel diaĵojn de la lumo.

Tamen, tio ne sufiĉis; la homa fantazio kaj la dia volo suprenlevis Dioskurojn ĝis la ĉielo. Kastoro kaj Polideŭko (Polukso) iĝis steloj kaj ĉiam staras kune, la unu apud la alia, konsistigante la konstelacion Ĝemeloj!

Kion pli multan povus deziri eĉ la plej granda kaj amata heroo?

verkis **Spiros Sarafian**, el Grekujo

verkis **Ruhşen Doğan Nar**, el Turkujo

la akvon en la maron, ĉu konsentinte?”

“Bone, konsentite mia komandanto,” diris la du infanoj; ili per soldata mieno salutis kaj poste komencis forĵeti la akvon en la maron.

Fatma ŝtonigita per timo tuŝis la ŝultron de sia fratino.

“Eku Ayşe, ni devas remadi pli rapide. Ni ne havas multan tempon.”

Ayşe kapjesis. Ŝi sentis sian koron en sia gorĝo. Tio, kion ili timis, nun estis okazanta: La boato estis pleniĝanta de akvo.

Ne ŝajnis, ke la malplenigo de la boato pri kiu zorgis la infanoj estis utila. En la boaton senhalte estis eniranta akvo. Ili daŭre remadis provante, ke la infanoj ne rimarku sian timon. Sed la lumoj de la kontraŭa marbordo ankoraŭ estis tre for.

Post duonhoron, ankaŭ la virinoj devis halti la remadon por malplenigi la boaton per siteloj; tamen ili ne sukcesis malhelpi la profundigon de ĝi en la maron.

Dum la boato estis malrapide enprofundiĝanta en la malluma maro, Hasan komencis krii:


“Sufiĉas... sufiĉas, mi droniĝas... ĉi tiu ludo finiĝu... sufiĉas! Haltigu la ludon! Bonvolu... sufiĉas!”

Kiam la ludo haltis, Hasan, demetis la ilon de virtuala realaĵo el sia kapo. Li estis terure ŝvita. Liaj karbonigraj okuloj estis plenaj je larmoj. Lia instruisto provis trankviligi lin:

“Bone Hasan, ĝi jam finiĝis... ĝi finiĝis. Vi povas trankviliĝi. Enspiru profunde. Malstreciĝu. Vi estas sekura.”

En la urbo Berlino en Germanujo, ĉiuj lernantoj de la kvara klaso estis vizitantaj la Centron de Virtuala Realaĵo en la Historia Muzeo. Ĉiu el ili, kadre de la “semajno pri historio” revivus la travivaĵojn de siaj prauloj virtuale. Poste ili verkus raporton pri tiuj memoraĵoj, kiujn ili spertis.

Hasan, nomita pro la nomo de sia avo, jam spertis



la vojaĝon, kiun faris lia avo antaŭ kvindek jarojn el Turkujo al Grekujo. La komputila programo pri virtuala realaĵo estis kreita surbaze de la rakontado de lia avo Hasan.

Lia avo estis la nura homo kiu postvivis tiun vojaĝon. La greka boato de marbordaj gardistoj lin lastmomente rimarkis kaj savis lian vivon.

La patrino, la onklino kaj la kuzo de lia avo droniĝis en la Egeo tiu nokte. Liajn kadavrojn oni trovis la postan tagon sur la strandoj de Smirno. Poste oni entombigis ilin en la 412-a sektoro en la "Tombejo de Nekonatuloj". Tion nek Hasan, nek sia avo Hasan sciis.

Hasan ankoraŭ estis sub la influo de tiuj, kiujn li vidis. Elirante la Centron de Virtuala Realaĵo li

renkontis sian amikon Isaak el la sama lernejo, kiu estis atendanta sian viĉon.

Hasan pene ridetis kaj diris al sia amiko: "vi povas eniri".

Isaak per timemaj paŝetoj eniris la ĉambron. Li estas revivonta la memorojn de siaj prauloj. Ĉefe la memoraĵojn de sia pra pra avo, kiu iam survivis nazian koncentrejon.

verkis **Ruhŝen Doĝan Nar**, el Turkujo
tradukis **Vasil Kadifeli**, el Tukujo

Fonto: <http://www.bilimkurgukulubu.com/edebiyat/kisa-oyku/ada-412-ruhsen-dogan-nar-kisa-oyku/>

La mortigo de Talo

tradukis kaj sendis **Bardhyl Selimi**, el Albanujo

Rakonto de **Adil Olluri**, el Albanujo

Zenel, rondforma viro, kiu antaŭ nelonge fariĝis 50 jara, hodiaŭ matene, malvarmsange, kiel neniam antaŭe, mortigis Talo-n. Post kiam li estis traborinta la ties freŝan korpon per du kugloj, li ekkompatis la povrulon. Mem li estis kreskiginta ĝin, disiginte lin disde lia patrino, kiun li same estis mortiginta, sed ne per sia mano, ĉar tion aranĝis por li sia najbaro, Halim, poste rekompencita per mono pagita kutime al ordinara laboristo.

Pasis du horoj kiam la mallumo adiaŭis la plej periferian kvartalon de la urbo kaj la palaj radioj de la suno kunfrontiĝis al Zenel, karesante la ties flavan lanon de lia subtila barbo. Tuj post la intersalutado kun ĉi tiuj senvarmaj radioj de printempa tagiĝo, kiam ĉiuj ties familianoj dormis, li prenis sian revolveron, ne uzitan longajn jarojn, ekde la nuptofesto de sia filo. Li plenigis ĝin per kugloj, aĉetitaj tagon antaŭ hieraŭ ĉe lia iama amiko kaj, alproksimiĝis malrapide al Talo, kiu vagadis ĉirkaŭ la kortaj muroj kaj mirrigardis al Zenel, kvazaŭ ĝi dubis ion pri li. Jen ĝi rigardis lin, alproksimiĝante paŝon post paŝo, jen ĝi rigardis la domon kaj jen la kortajn pordojn, kiuj estis duonmalfermitaj. Kaj, rimarkinte ke ĝi ekrigardis al la kortaj pordoj, Zenel plirapidigis la paŝojn kaj eligis sian armilon tuje. Talo okulvidis lin, kvazaŭ volus plorpeti humile lin je la nomo de tiuj pasigitaj jaroj en tiu familio, sed la dommastro neniel intencis plutoleri. Li elpafis al ĝia korpo dufoje, unue per kuglo al la brusto, sed, vidinte ke ĝi estis kriante per senforta voĉo kaj estis movante la piedojn, klopodante stariĝi, li elpafis ankaŭ la duan kuglon surkapen.

Kiam li certiĝis ke Talo ne plu enspiris, Zenel

surgenuiĝis kaj eklarmiĝis, sentante ian debilecon kaj bedaŭron pri ĝi. Eniginte la revolveron en la poŝon, li envolvis la korpon de Talo per plasta sako por poste forĵeti aŭ enterigi ĝin en iun profundan abismon aŭ en iun montorandon.



Farante ĉi tiun involvan ritualon, la kapsango de Talo ruĝigis la manojn kaj la vestojn de Zenel, kiu, senzorgema kiel li ja estis, eniris en la hejmon, kie ĉi tiuj makuloj terurigis sian filinon, Albuleno-n, kiu timiĝis treege kiam vidis sangon. Des pli, kiam ŝi eksciis ke temis pri Talo, preskaŭ tute perdis la konscion. Pri ŝi ekzorgis la patrino, Hajrie, kiu, preter la kvietigo de sia filino, konvinkante ŝin ke Talo estus nepre mortigenda, atentis ankaŭ pri la purigo de sia edzo en la banejo de la unua etaĝo de la domo.

- Mi jam mortigis tiun fihundon... Finfine ni saviĝis de li.

- Povrulo- sin esprimis dolore Hajrie, purigante la kafkoloran pantalonon de sia edzo.

Talo estis la unua hundo kaj la sola kiun havis iamfoje la familio de Zenel Shala, alveninta en Prishtina ¹ antaŭ duonjarcento el profunda vilaĝo de Dukaĝin ². Dum ses longaj jaroj, ĝi estis karesata de ĉiuj familianoj, eĉ la plej privilegiito ilia en ĉio ĝi fariĝis. Aparte prizorgis ĝin la familiestro, tenante apude ekde ĝi estis hundido dusemajna, li ankaŭ nomumis ĝin Talo, per kio poste vokis ĉiuj. Zenel nutris kaj promenis ĝin, dresis ĝin kaj lernigis multajn kozojn, per kiuj amuziĝis ne nur li, sed ankaŭ liaj proksimuloj. Li parolis kun ĝi, konis la ties lingvon, la gestojn. Tiel proksima fariĝis Talo al li, kiel ĝi jam konis la precizan horaron kiam li revenis el la laborejo kaj kontinue, ne



malĉeestante eĉ unu tagon, atendis lin leviĝante sin per la antaŭaj kruroj kaj alsaltis ĉirkaŭbraki lin. Samtiel, dum la semajnaj tagoj, kiam sia mastro vojaĝis eksterlanden pro laboro, la fidela hundo sentadis

lian malĉeeston kaj enfermiĝis en si, ne akceptante ludi kun iu ajn el la ceteraj familianoj, ĝiskiam li revenis, kiu ĝin tre bone komprenis. Tiel intima estis ilia interrilato, kiel la najbaroj de la familio Shala mokdiris al Zenel, deklarante ke "vin pli multe obeas Talo ol la viaj du filoj".

Zenel, dum ĉi tiuj lastaj jaroj, travivis sinsekvajn ĝojojn en sia familio, sed unu el la plej notindaj estis la nuptofesto de la pliaĝa filo, Blerim, kaj aparte la naskiĝo de la unua nepo el tiu geedziĝo, Erëmir, pri kiu li feliĉiĝis preskaŭ tiel multe, kiel la nepaj gepatroj. Tia entuziasmo kreis apartan rilaton inter la avo kaj la nepo, kreskinta pli multe, kiam la posteulo de la familio fariĝis unujara, kaj kulminis aŭ duobliĝis, kiam li fariĝis dujara kaj komencis memstare piediri kaj paroli, substrekante dolĉece la jam konitajn vortojn. La familiestro havis nun plian karesulon, kies amo jam ekvilibris, eĉ transpasis tion por Talo. Komenciĝis alia tempo por li, kiam li pli longe restis kaj promenis kun la dujara Erëmir, ol kun la hundo ĝis hieraŭ ne disigebla.

Tion apenaŭ povus elteni Talo. Li ne toleris la fakton ke, dum la promenoj kun sia mastro, ĉeestu ankaŭ iu alia, kiu, ĝis hieraŭ, estis nekonata estaĵo por ĝi. Pli multe gravigis la situacion la fakto, ke Zenel multfoje mankaptis la nepon kaj promenis sole kun li, sen Talo. La hundo eksentiĝis ignorata kaj senigita je privilegioj antaŭe ĝuataj de ĝi. Pro tio, ĝi apenaŭ povus toleri kaj decidis reagi. La unua kiu rimarkis la ribelemon estis mem la mastro, ĉar li konstatis ke ĝi ekbojas iel strange, kiamfoje li kunpromenas kun la nepo, sed, unue, li ne konsideris tion ion maltrankviligan. Sed la protestaj bojadoj plioftiĝis de tago al tago, kaj nun ilin aŭdis ankaŭ la ceteraj familianoj, kiuj, la ĵaluzon de Talo al la eta Erëmir, unue, ne traktis serioze, sed simple kiel bela ŝercaĵo pro kio ili ridegis dum la interparoloj.

Nur unu persono ektimis serioze pro tiaj reagoj de la familia hundo. Tiun maltrankvilon havis ĝuste la

patrino de la etulo, la belulino Edona, kiu, longajn tagojn, petegis sian edzon, same sian bopatron, ke ili forigu la hundon disde la domo plej baldaŭe. Sed, kiel la edzo, tiel la bopatro iĝis surdaj al la demando de la novedzino, lasante ŝin en ĉiutaga ĉagreno.

La hundaj bojadoj al la nepo de Zenel pli kaj pli oftigiĝis, fariĝante de tago al tago pli ekscitemaj kaj agresemaj. Tiuj, de momenteto al momenteto, fariĝis abomenindaj ankaŭ por la ceteraj anoj de la familio Shala, ĉar Talo, ilia hundo, la ĝisnuna fidelulo, ne nur bojis, sed ankaŭ alsaltis, kvazaŭ freneza, al Erëmir, kaj, se ne troviĝus kelkiu apud ĝi, Dio scius kio okazus al la eta anĝelo. Tio maltrankviligis definitive la familion Shala kaj nun estis ne nur la novedzino de Blerim, kiu demandis la forigon de la hundo, sed la tuta familio konsentis ke Talo ne plu restu en la hejmo eĉ plian momenteton. Sed Zenel, tre ligita kun ĝi, insistis, ke antaŭ ol oni decidu definitive, li venigos la bestkuraciston, kun kiu li jam difinis rendezuon la morgaŭon, lasante tiel la familion travivi plian tagon da anksio.

La morgaŭon, je la deknua antaŭtagmeze, dum la avino Hajrie estis promenante kun la nepo tra la korto, Talo, senatendite, estis kaŝe alproksimiĝinta kaj mordinta la etulon sur la ties maldekstra kruro, klopodante forpreni lin per siaj akraj dentoj kaj kunporti eble en iu lokon, kie certe ĝi disŝirus kaj dispecigus lin. Sed, tiujn momentetojn, la avino estis akirinta forton, kvazaŭ alveninta el la ĉielo, tiel ŝi estis kaptinta kaj foriginta la hundan kapon fulmrapide, ne permesante al la hundo ke ĝi alfiksu pli profunden siajn dentojn en la subtilan etulan karnon. Ŝi estis savinta la nepon de la plej malbono.

La juna patrino de Erëmir teruriĝis kiam ŝi vidis sian filon en tia stato, el kiu, krom la larmoj elgutis senĉese ankaŭ sango pro vundo sur la kruro. Talo, kvankam estis haltigita enigi pli profunden siajn dentojn en la kruron de la knabo, tamen ĝi estis disŝirinta la eksteran parton de la haŭto, postlasante incizuron en la malantaŭa parto, subzone de la ties maldekstro.

La sama travivaĵo trafis ankaŭ Albulena-n, kiun, pro debileco en la koro, ne plu tenis la piedoj.

Intertempe, Zenel revenis kvazaŭ freneza de la urbo, sin pentante plejmulte, kiel ĉefkulpulo, ĉar li ne havis eblecon por eviti tian tragedion.

tradukis **Bardhyl Selimi**, el Albanujo

¹ Ĉefurbo de Kosovo

² Regiono en Kosovo

DUA PARTO - LA VIVO



iun personon?

51

TAŬO estigas la aĵojn.
VIVO nutras ilin.
La ĉirkaŭejo formas ilin.
La influoj perfektigas ilin.
Tial ĉiuj estaĵoj honoras **TAŬO**-n
kaj ŝatas **VIVO**-n.
TAŬO estas honorata,
VIVO estas ŝatata
sen ekstera nomumo, tute per si mem.

Do: **TAŬO** estigas ilin,
VIVO nutras ilin,
kreskigas ilin, flegas ilin,
perfektigas ilin, konservas ilin,
kovras kaj protektas ilin.

Rimarkoj de Anniespera

Vilhelmo: "ĉar **VIVO** estas boneco."

En la originala teksto la vorto "ĉirkaŭejo" wu (fonetike) signifas "materio" kaj la vorto "Cinfluoj" "shi" (fonetike) signifas "cirkonstanco".

En la traduko de Vilhelmo mankas la sekvaj frazoj, tradukitaj de Wang Chongfang:

"Doni vivon al ili sen ilin posedi,
Meti ilin en movon sen atribui al si la meriton,
Kaj esti ilia suvereno sen ilin regi,
— Ĉio ĉi estas nomata la profunda Virto."

Rimarkoj de Cezar

"Ĉu oni nepre devas posedi ion por esti sukcesa?" Tiu demando fariĝis centra temo ĉe Karlo Marks. Ĉe la individua anarkiisto Maks Stirner tiu demando havas krom la jura signifo ankaŭ alian. Laŭsence li demandis: Kiu vere posedas la mondon, ĉu tiu, kiu laŭjure posedas ĝin, aŭ tiu, kiu efektive regas ĝin spertante, prilaborante, esplorante kaj eĉ estetike ĝuante? Ĉu posedanto de io estas vere nur ties jura posedanto aŭ tiu, kiu vere regas iun proceson, iun aĵon aŭ

52

La mondo havas komencon,
tio estas la patrino de l' mondo.
Tiu, kiu trovas la patrino
por koni la infanojn,
kiu tiam konas ŝiajn infanojn
kaj revenas al la patrino,
dum sia tuta vivo ne endanĝeriĝos.
Tiu, kiu fermas sian buŝon
kaj fermas sian pordojn,
dum sia tuta vivo ne devos suferi.
Al tiu, kiu malfermas sian buŝon
kaj volas enordigi siajn negocojn,
ne eblas helpi dum ties tuta vivo.
Vidi la plej sensignifan signifas sagaci.
Konservi la saĝon signifas esti forta.
Se oni uzas sian lumon
por reveni al la sagaco,
tiukaze oni ne endanĝerigas sian personon.
Jen la mantelo de l' eterneco.

Rimarkoj de Anniespera

Pri reveni al la patrino: En la originala teksto, la vorto "shou" (fonetike) signifas "gardi, defendi, protekti."

Vd. de Wang Chongfang:

"Povas firme aliroĉi al la Patrino"

En la originala teksto, la vorto "rou" (fonetike) signifas "moleco, malforteco.", male al via traduko "forta".

"Kaj tiu, kiu gardas siajn molecon kaj malfortecon, estas potenca."

Rimarko de Cezar

Sekve tion, homo, kiu rigardas nur sian fortecon, estas en vero malforta, ĉar tiu homo uzas nur parton de sia personeco. Kaj saĝo do signifas ankaŭ povi esti malforta, mola. Krudulo estas nur korpe forta, sed ne ties psiko.

(daŭrigota)

17 >> Anstataŭe ni devas rekoni, ke Sisifo estis feliĉa ĉar la senutila lukto de ruliĝadi la rokon estis io, kio faris sian vivon valoran kaj preferindan al morto.

Ekzistadismo poste fariĝis kulto. Miloĵ da junuloj estis allogitaj al ĝi kaj diskutis la absurdecon de homa ekzisto dum noktoj kaj noktoj. Ĝi inspiris romanojn, ludojn kaj filmojn. Ĝi estis filozofio, kiun homoj povus apliki al sia vivo kaj al siaj propraj decidoj.

Sartre poste partoprenis en la maldekstra politika

ideo kaj li provis kombini Marksismen al siaj ideoj sed tio estis malfacila afero. Komence lia ekzistadismo centriĝis sur individuoj kiuj faras elektojn por si mem, sed poste liaj verkoj priskribis nian partoprenon en pli granda grupo de homoj kaj kiel sociaj kaj ekonomiaj faktoroj rolas en niaj vivoj.

Sartre probable estis la plej konata filozofa de la 20--a jarcento.

(daŭrigota)

Karaj geamikoj, karaj legantoj,
Kun plezuro, mi prezentas al vi mian novan
tradukaĵon. Temas pri novelo, eĉ mallonga
romano, de Irène NEMIROVSKY (1903-1942). Image



Irène naskiĝis en Ukraino (tiam
Rusia Imperio) en juda familio,
kiu parolis la francan. Kiam
komencis la Rusia Revolucio, ŝi
migris kun sia familio al
Francio, kie ŝi iĝis fama
verkistino. Arestita de francaj
ĝendarmoj kaj deportita, ŝi estis
mortigita de la nazioj en

Aŭŝvico (Auschwitz). Forgesita post la Dua
Mondmilito, ŝi estas la sola verkisto, kiu ricevis la
Premion Renaudot postmorte pro ŝia longa romano
"Suite française" (2004).

(Ligiloj :

<https://www.ipernity.com/blog/mike59/685797>

kaj ankaŭ ĉi tie:

<https://novajhoj.weebly.com/libroj-en-esperanto.html>

aŭ ĉe Facebook:

<https://www.facebook.com/groups/librejo/files>)

Mi deziras al vi agrablan legadon!

MIKELO (Michel Dereyger)

LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)

(daŭrigata)

Ŝi fermis la vitron kaj ne plu aŭdiĝis la ventosiblo.
Restis nur la malforta brueto de la gipso fluanta en la
malnovaj muroj kun la frustrado de sablohorloĝo, kaj
la obtuza kaj profunda krako de la malnovaj
lignotegaĵoj ronĝitaj de la ratoj...

Tatjana Ivanovna revenis en sian dormoĉambron,
longe preĝis kaj senvestiĝis.
Estis malfrue.

Ŝi blovis la kandelon, suspiris, plurfoje laŭtvoĉe
rediris en la silento " Dio mia... Dio mia... " kaj
endormiĝis.

Fino de la dua ĉapitro.

Tria Ĉapitro


Post kiam Tatjana Ivanovna fermis la pordojn de la
senhoma domo, ŝi supreniris al la eta belvedero
aranĝita sur la tegmento.

Estis silenta nokto en majo, jam varma kaj milda.

Suĥarevo brulis; oni klare vidis la flamojn flagri, kaj
aŭdis la malproksimajn kriojn alportitajn de la vento.

La familio Karin fuĝis en Januaro 1918, kvin
monatojn antaŭe, kaj de tiam Tatjana Ivanovna

ĉiutage vidis ĉe la horizonto la
brulegon de vilaĝoj poste estingitan
kaj denove fajrigitan, samtempe kiam
tiuj pasis de la Ruĝuloj* al la
Blankuloj** kaj refoje al la Ruĝuloj.
Sed neniam la bruligo okazis tiel
proksime, kiel tiun vesperon. La rebrilo
de la flamoj tiel nete prilumigis la forlasitan parkon, ke
videblis la lilakaj arbustoj antaŭtage ekflorintaj sur la
centra aleo.



Trompitaĵoj de la lumo, la birdoj flugis kiel en hela
tago... La hundoj blekis. Kaj la vento turniĝis,
kunportante la bruon de la fajrego kaj ties odoron. La
forlasita malnova parko reiĝis kvietaj kaj malluma, kaj
la parfumo de la lilakoj plenigis la aeron.

Dum momento, Tatjana Ivanovna atendis, suspiris
kaj malsupreniris.

Oni jam deprenis la tapiŝojn kaj tapetojn. La
fenestroj estis najligitaj per tabuloj kaj protektitaj per
feraj stangoj. En la keloj, la arĝentaĵaro estis
ordaranĝita en la fundo de kofroj. Ŝi jam petis, ke oni
enterigu la valoregan porcelanon en la malnovan
forlasitan parton de la fruktoĝardeno. Luj el la
terkultivistoj jam helpis ŝin. Ili imagis, ke tiuj riĉaĵoj iam
fariĝos iliaj posedaĵoj...

Nuntempe la homoj zorgas pri la havaĵo de sia
proksimumo nur por ekpreni ĝin...

Tiel, ili diros nenion al la komisaroj de Moskvo, kaj
poste ... oni vidos!...

Fakte, sen ili ŝi povus nenion fari...

Ŝi estis sola; jam de longe foriris la servistaro. Nur
la kuiristo Antipe lastvice postrestis kun ŝi ĝis kiam li
mortis en marto. Li havis la ŝlosilon de la kelo; krom
tio, nenion alian li deziris.

"Vi malpravas rifuzi vinon, Tatjana" li diris; "ĝi
konsolas ĉiujn malfeliĉojn. Rigardu, ni estas solaj,
forlasitaj kvazaŭ hundoj, kaj mi kraĉas sur ĉion! Por mi
ĉio estas egala dum mi havas vinon..."

Sed ŝi neniam ŝatis drinki.

Unu vesperon, tio okazis dum la lastaj martaj
neĝblovdadoj, ili ambaŭ sidis en la kuirejo; li komencis
deliri, memorigis pri la tempo, kiam li militservis.

"Ne tiel stultaj estas tiuj junuloj kun sia revolucio...
Ĉiu laŭvice!... Ili sufiĉe trinkis nian sangon, tiuj aĉaj
porkoj, la malbenitaj barinoj!..."

Ŝi respondis nenion.

Kial respondi?

Li jam minacis bruligi la domon, vendi la juvelojn
kaj la kaŝitajn ikonojn...

(daŭrigota)

tradukis **MIKELO** (Michel Dereyger), el Francio

EKRA 2018 - Dua premio en poezio

MALBENO

Oni diras ke junulino
en sian malbenon
enteksas forton de Tero.
La malbeno ŝia estas
peza kiel montaro,
forta kiel naturo,
detruiga kiel inundo,
varmega kiel Suno,
senkompata kiel destino,
konstanta kiel tempo,
neevitebla kiel maljuneco.

* * *

Malbenitaj estu vi
kiuj forrabis lin!

Atingu vin miaj malbenoj
pro la lipoj nekisitaj,

pro la haroj netaŭzitaĵ,
pro la brusto netuŝita,
pro la sonĝoj neforsonĝitaj,
pro la revoj nefantaziitaj,
pro la malpacoj subpremitaj,
pro la infanoj nenaskitaj,
pro la aŭroroj neĝisatenditaj,
pro la padoj netransiritaj,
pro la junaĝo netravitaj
pro la ludoj neforluditaj
kaj la deziroj neplenumitaj.

Atingu vin mia malbeno;
vi ne sciu pri amo,
oni memoru vin laŭ malbono,
fremda sango
je via sojlo ekbolu,
viaj prebendoj herbe kovriĝu,
viajn palacojn kaŝu rubuso,
ke via spuro ne restu,
ke filo mortigu patron,

kaj frato mortigu fraton,
kaj ke ili neniam
estu kontentaj.

Malbeno ĉi tiu
en mi maturiĝis, en mi estas
matura,
de mi al ŝtono donacita.

Se aŭtuno ploras per pluvoj
se Tero ploras per fontoj,
tiam ja ŝtono ekploru
je mia nomo.

Verkis **Dimitrie Janičič** el Serbio

Dua premio pri poezio en EKRA
2018 konkurso

EKRA - 2018 en Razgrad, Bulgario por 29a fojo

La 01an – 03an de junio en Razgrad, Bulgario okazis por 29a fojo jam tradicia Esperantista Krea Renkontiĝo "Abritus", organizita de la Esperantista Domo pri kulturo "D-ro Ivan Kirĉev". En la programo de la festo estis prezentita plej nova libro de Ivaniĉka Maĝarova "Sortoj sur vojkruciĝo" kaj estis anoncitaj la rezultoj de la du konkursoj – la Internacia konkurso por originala esperanta poezio kaj humuro kun prezidanto de la ĵurio Venelin Mitev – elstara bulgara verkisto, tradukisto, ĵurnalisto, esperantisto kaj ĵurianoj: Josip Pleadin – elstara kroata verkisto, eldonisto, esperantisto kaj Ivaniĉka Maĝarova – longjara esperantistino kaj verkistino; La dua konkurso por traduko el bulgara okazas por 5a fojo. Ĝia ĵurio konsistas el: Marina Kumanova – prezidanto, denaska esperantistino kaj instruistino, D. Kateva – instruistino, filologo kaj M. Georgieva – multjara esperantistino, instruistino. Partoprenis 12 personoj el 6 landoj.

sendis **Dimitrinka Kateva**

prezidanto de la Esperantista Domo pri kulturo en Razgrad, Bulgario

La Teorio Nakamura

-- facila legolibro de Anna Lowenstein

La kerna rakonto de la nova Lernu.net retejo,
"La Teorio Nakamura", finfine aperis
libroforme.



Ĝi estas tre taŭga por lernantoj, ĉar ĝi
sekvas la saman principon kiel la konata
libro "Gerda Malaperis" de Claude Piron.
Ĝi komenciĝas tre facile en la unua
ĉapitro per malmultaj vortoj kaj nur bazaj
gramatikaj strukturoj, sed en ĉiu ĉapitro
aldoniĝas pli da vortoj kaj pli da gramatiko. La kurso
de Lernu estas bazita sur tiu rakonto. Cetere, la libro
mem estas tre alloga, kun belaj ilustraĵoj.



La libro estas mendebla ĉe Lernu.net (ĉe **Peter Balaz**: peter.balaz@ikso.net).

Ŝercoj



— Bonvolu pruntedoni vian nigran kompletan? Mia avo mortis.
— Jes kompreneble. Ĝi estas en la ŝranko.
Post du semajnoj.

— Estus bone, se vi redonus mian kompletan.
— Ĉu vi freneziĝis? Ja, kun ĝi estis enterigita mia avo.

* * *

Iufoje du fantomoj promenadis nokte en la antikva palaco.

Subite ili ekaŭdis iun bruon kaj unu el ili timegis.

Sed alia fantomo diris al sia timema amiko:

- Trankviliĝu! Ĉu vi vere kredas je la naivaj fabeloj pri vivuloj?

Ŝi: Mi ne trovis harojn sur via ĉemizo!

Li: Do??

Ŝi: Kiu estas tiu senhara fiulino?



Krucvortenigmo

-- el Semajno de Enigmoj




HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Atentu, ____, ek!; 6. Likvo fluanta en la arterioj (akuzativo); 7. Atentu, pretu, ____ !; 8. Ankaŭ Konata Kiel; 9. Dura leĝo, ____ leĝo; 11. Simbolo por astato je kemio; 12. ____, pretu, ek!; 14. Tempo sen suno.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. ____ de cigaredoj; 2. simbolo por radono je kemio; 3. Plej forta, ekstrema; 4. ____ kaj fugo (Bach); 5. Sanktoleu!; 6. La ____ de Januaro estas la Epifanio (akuzativo); 10. La numero post 9; 13. Konsonantoj de unito.



UEA Estraro

En la lasta komitata kunsido okazinta dum la 103-a UK en Lisbono la Komitato de UEA, sekvanta la elstaran laboron de la Elekta Komisiono, elektis novan nomon por estrarani pri Kongresoj kaj Kulturo ĝis la fino de tiu nuna oficperiodo. Temas pri la 35-jaraĝa brazilano Fernando Maia Jr. En la unua estrarkunsido en la dimanĉo tuj post la UK Fernando ankaŭ akceptis la respondecon labori pri Afriko. La nova estraro laboras ĉiutage de tiam por UEA, oni povas diri tage kaj nokte kaj kun vera granda ĝojo. Ni devas danki al la sindonaj samideanoj en la Elekta Komisiono, samkiel al la ĉiam atenta Komitato kaj al la Centra Oficejo - direktoro kaj oficistoj. Ĉiuj fakte laboras kune por UEA. Kaj sendube ankaŭ al vi, UEA-membro kaj amiko, sen kiu ne sencus labori monde por Esperanto. Ni restu kaj laboru kune! Por plia informo pri la estraro aliru: <http://uea.org/asocio/estraro>



Universala Esperanto-Asocio

Estraro 2016-2019



Mark Fettes
Prezidanto
Kanado

Emiljo Cid
Informado
Brazilo



Stefan MacGill
Vicprezidanto
Hungario

Sara Spanò Aktivula
Maturigo, Eksteraj Rilatoj
kaj Terminologio Italio




Aleks Kadar
Ĝenerala Sekretario
Francio

Trezoro Huang Yinbao
Financoj kaj Unesko
Ĉinio



Lee Jungkee Azio kaj
Scienca kaj Faka
Agado Koreio

Fernando Maia Jr.
Afriko, Kongresoj kaj
Kulturo Brazilo



<https://uea.org/asocio/estraro>



Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la jena filozofo.

Vasil Kadifeli

Jean-Paul Sartre (1905-1980), Simone de Beauvoir (1908-1986) kaj Albert Camus (1913-60)

La Angoro de Libereco

Jean Paul Sartre estas la plej fama filozofo pri ekzistadismo. Li ankaŭ estis novelisto, dramisto kaj biografisto. Li grandparte vivis en hoteloj kaj verkis en kafejoj. Li ne aspektis esti kulta figuro, tamen li poste tiel fariĝis.

Simone de Beauvoir ofte kunigis Sartre en kafejoj. Ŝi estis lia longtempa kunulo, kvankam ili neniam edziĝis kaj neniam vivis kune. Ŝi ankaŭ estis filozofo kaj novelisto. Ŝi skribis gravan fruan feminisman libron "La Dua Sekso" (1949).

Dum la plejparto de la Dua Mondmilito la vivo por francoj estis tre malfacila. Post la milito estis tempo komenci novan freŝan vivon. Oni devus forgesi la pasintecon. Estis tempo pripensi kian socion konstrui. Post la okazintaj teruraj aferoj homoj demandis al si demandojn kiel: "Kio estas la signifo de vivo?", "Ĉu ekzistas Dio?", "Ĉu mi devas ĉiam fari tion, kion la aliaj atendas, ke mi faru?"

La temo de la libro de Sartre "Esto kaj Nenio" (1943) estis pri libereco. Homoj estas liberaj. Stranga mesaĝo ĉar homoj en la okupata Francio estis kvazaŭ malliberuloj en sia propra lando. Sartre ne kredis je la ekzisto de ia Dio, kiu desegnis nin. Sed kio ia desegnita homo devus fari? Ni ne estas ĉi tie pro ia kialo, li pensis. Homo povas elekti kion fari kaj kio fariĝi. Ni ĉiuj estas liberaj. Evidente, se vi elektas ion fari, vi eble ne ĉiam sukcesos en ĝi. Sed vi respondecas pri via volo fari tion kaj pri viaj respondoj al viaj fiaskoj.

Estas malfacile pritrakti liberecon kaj pro tio homoj ŝajnigas, ke ili ne vere estas liberaj. Ni tute respondecas pri tio, kion ni faras ĉiutage kaj kiel ni sentas pri tio, kion ni faras. Se ni estas malĝojaj nun, tio estas nia elekto. Ĉi tio timigas homojn, ĉar ili ne ŝatas alfronti tiu veron. Sartre diras, ke ni estas "kondamnitaj je libereco". Ni estas kaptitaj en ĉi tiu libereco, ĉu ni ŝatas ĝin aŭ ne. Por iu, kiu ŝajnigas tre stiligita pri sia laboro, Sartre diras, ke li estas en "malbona fido" kaj "malbona fido" signifas forkuron de libereco. Ĝi estas ia mensogo, kiun vi diras al vi mem

kaj preskaŭ kredas ĝin. La mensogo, ke vi ne rajtas elekti kion fari en via vivo. Sed vi fakte rajtas al tio, ĉu vi ŝatas tion aŭ ne.

Sartre diris "Ekzistadismo estas Humanismo", kaj priskribis la homan vivon esti plena je angoro, ĉar ni komprenas, ke ni ne povas havi ajnan ekskuzon, sed ni respondecas pri ĉio, kion ni faras. Sed angoro estas eĉ pli malbona ĉar ĉio, kion ni faras kun nia vivo, estas ŝablono por tio, kion la aliaj devus fari kun siaj vivoj. Per la elekto, kiun ni faras en nia vivo, ni pentras bildon pri tio, kion ni opinias, ke homoj devas esti tiaj. Se ni tion faras sincere, ĝi estas granda respondeco. Unu ekzemplo estis studento, kiu li iam venis al Sartre por demandi, ĉu li devus resti hejme por prizorgi sian malsanan patrinon aŭ aliĝi al la rezistadon por batali la germanojn. Lia elekto estus ekzemplo pri tio, kion ĉiuj aliaj devus fari. La konsilo de Sartre estis frustriga. Li konsilis al la studento, ke li tion devus elekti mem. Ne eblas eviti la pezon de respondeco, kiu venas kun la ideo esti homo.

"Ekzistadismo" estis la nomo donita al la filozofio de Sartre. Ni unue trovas nin ekzisti en ĉi tiu mondo, kaj tiam ni devas decidi pri kion ni faru kun nia vivo. Sed kio se ni estus desegnitaj por aparta celo? Sartre kredis, ke ni ne estis desegnitaj, kaj ke nia ekzisto venis antaŭ nia esenco, sed por desegnitaj objektoj la esenco venas unue antaŭ ilia ekzisto.

Simone de Beauvoir en sia libro "La Dua Sekso" donis al ekzistadismo diversan signifon. Ŝi diris, ke virinoj ne naskiĝas kiel virinoj sed ili tiel fariĝas poste, ili inklinas akcepti la vidpunkton de viroj pri kio estas virino. Tamen estas libera elekto fariĝi aŭ ne tia virino. Ŝi asertis, ke virinoj ne havas esencon donita de naturo pri kio ili devas esti.

Alia temo en ekzistadismo estas, ke ekzisto estas absurda. Vivo ne havas ian signifon ĝis ni donos al ĝi signifon per niaj elektoj, kaj poste venas morto kiu forigas ĉiujn signifojn ni donis al ĝi. La respondo de Sartre estis tia, ke homo estas 'senutila pasio': estas neniu punkto pri ĝia ekzisto. La sola signifo estas tio, kion ni kreas per niaj elektoj.

Albert Camus, novelisto kaj filozofo kaj ankaŭ ligita al ekzistadismo, uzis la grekan miton pri Sisifo por klarigi la homan absurdecon. La puno de Sisifo por trompi la diojn estis, ke li devis ruli grandegan rokon sur la supron de monto sed kiam li atingis la supron, la roko ruliĝis malsupren kaj li devis komenci denove. Sisifo devis ripeti ĉi tion por ĉiam. Homa vivo estas tiel, kiel la tasko de Sisifo: tute senutila. Neniu respondo ekzistas por klarigi vivon. Ĝi estas absurda. Sed Camus ne pensis, ke ni devas senespero.

>> 13

Ĉi tiu estas fabelo de ĵemajtaj fabeloj tradukita el litova lingvo al Esperanto per samideano Antanas VAITKEVIČIUS, emerita instruisto de angla lingvo. Li loĝas en Alsédžiai, distrikto de Plungė. Li esperantistiĝis preskaŭ antaŭ 50 jaroj dum studado en Vilniusa universitato (1966-1971). Li verkis versojn en Esperanto, partoprenadis konkursojn "Muzo". Ĝuu la tradukaĵon.

sendis **Povilas Jegorovas**
el Litovio

-- oOo --

am mortanta patro heredigis sian bienon al la plej aĝa filo, kaj la pli juna ricevis sesdek ormonerojn por ke li klerigu sin kaj povu vivteni. Tamen almenaŭ la patro kovris siajn okulojn, la pliaĝulo forpelis la pli junan sian fraton el la domo dirante:

- Por kio vi bezonas la sesdek monerojn, se vi estas stulta, kiel arbostumpo? Vi malŝparos la monon sencele kaj senprofite. Mi ja konas vian saĝon! Ne senbezone oni nomas vin stultulo. Ekloĝu en la ĉearbara banejo, do vi almenaŭ la arbaron prigardos.

Nenio estas farena por la junulo, li devis volemalvole konsenti. Li ekloĝis en la ĉearbara banejo kaj ankaŭ la fratan arbaron ekprigardis.

lutage, vagante inter arboj, li kaptis leporon. Ligis li ĝin al la ŝnureto kaj kondukas ĝin tra la vilaĝo. Subite li renkontas la plej aĝan fraton.

- Kian beston vi kondukas? – li estas demandata.

- Ho, ĉi-tiu estas tute nekutima besto. Ĝi estas nomata legomĝardenisto. Se vi lasos lin en la legomĝardeno, brasikoj tiel kreskegos, ke eĉ la trunkoj ne sukcesos ilin apogteni.

- Nekredeble! – miris la plejaĝulo kaj iliaj okuloj ekbrilis avide. - Mi eĉ ne konis, ke tiaj bestoj en la arbaro loĝas. Por kio vi tenas ĝin? Vi ja ne posedas legomĝardenon kaj mia brasika kampo estas senprizorga. Donu ĝin al mi.

- Ne! – respondĵetis la plejjunulo. – Senpage mi ne donos, sed se vi deziras, vi povas aĉeti.

Longe ili intertraktis kaj finfine ambaŭflanke konsentis je dudek ormoneroj. La plejaĝulo prenis la leporon kaj kondukinte ĝin en la brasikan ĝardenon lasis ĝin por mastrumadi tie.

Kaj leporo ĉiam estas leporo. Ĉirkaŭrodis li ĉiujn brasikojn kaj saltinte trans la barilon malaperis en la arbaro. Venis la pliaĝulo en la ĝardenon kaj tie nur solaj trunkoj staraĉas. Tre ekkoleris li kaj ekrapidegis al la plijunulo, intencante bati lin fortege.

Dume la plijunulo kaptis vulpon kaj alliginte ĝin al ŝnureto kondukas el la arbaro.

Alkuris la pli aĝa frato kaj krias:

- Kian ĝardeniston vi vendis al mi? Ĉiujn miajn brasikojn li rodmanĝis. Kia damaĝo!

- Kaj ĉu vi nutris lin antaŭ ol malfermi en la ĝardenon? – demandas la malplejaĝulo.

- Nu, ne! – agnoskis la pliaĝulo.

- Do, vi vidas nun. Kaj vi senkaŭze akuzas min. Se vi ne kapablis dece konduki kun tiu besteto, eble vi sukcesos kun ĉi-tiu – kaj montris per fingro la vulpon.

- Kaj kio estas tio? – reinteresiĝis la plejaĝulo.

Tio estas la plej bona kuracisto de kokinoj kaj anserinoj. Se vi lasas lin eĉ por unu nokto kune kun birdoj, ili tuj resaniĝas kaj la kokinoj abunde ekovumas.

- Ĉu vere? – priruĝiĝis je avideco la pliaĝulo. Donu lin al mi. Miaj kokinoj malbone ovumas, kaj la anseroj estas vere malsanemaj.

- Mi ne povas doni. Eble mi povas nur vendi.

Ili ree longe intertraktadis kaj finfine konsentis pri la kosto de dudek ormoneroj. Ricevinte la monerojn la junulo verŝis ilin en la poŝon kaj fajfante iris en la arbaron.

La plejaĝulo lasis la vulpon en la birdejo kaj matene trovis nur la plumojn anstataŭ la kokinoj. Ekkoleriĝis pri la frato ka forkuris por venĝi lin. Kaj tiu jam aperas el la arbaro kondukanta lupon.

La pliaĝulo ekskoldis lin dirante:

- Vi ree trompis min, stultulo. Mi nutrigis vian birdodoktoron per brasikoj, tamen li buĉis ĉiujn miajn kokinetojn kaj anasetojn, postrestante nur iliajn plumojn. Nu, mi nun prilaboros vian haŭton.

- Kaj ĉu vi donis al li ion trinki? – demandas la plijunulo.

- Ne - respondĵetis la pliaĝulo. – Kiel mi povis scii, ke mi devas trinki lin?

-Nu, vidu! Estas via kulpo. Anstataŭ ol kulpigi min aĉetu tiun-ĉi beston kaj pro ĝi vi vere profitos.

- Kaj kia estas ĉi-tiu besto?

- Li estas tre valora besto kaj estas nomata ŝafdoktoro. Almenaŭ li rigardas al ŝafo, tiu subite resaniĝas. Li ankaŭ bonege doktorumas pri bovidaj kaj ĉevalidoj...

- Nekredeble! – ĝojfrotas siajn manojn la pliaĝulo. - Mi ege bezonas tian doktoron.

- Do, prenu lin malmultekoste.

Longe ili pritraktadis, sed fine konsentis pri dudek ormoneroj. Kondukinte lin hejmen, tuj ŝovis lin en la stalon malpacience ĝisatendante la matenon.

Kaj la junulo prenis ĉiujn sesdek ormonerojn kaj

urĝe foriris en la urbon, kie li estis certa, ke la frato ne sukcesos lin trovi.

"Kiun vi nun nomos stultulo?" – murmuris li subnaze. – "Vi devis ja plenumi la patran volon."

Matene la pliaĝa frato trovis siajn ŝafetojn kaj bovidetojn forbuĉitajn kaj nenia signo estis

postrestinta pri la doktoro. Li estis eskapinta tra la fundamenta truo.

Netrasuferante la koleron li kuris al la banejo por serĉi la plijunulon, tamen eĉ liaj piedsignoj jam estis malaperintaj.

Hindua Mito: La Buterigado de la Oceano de Lakto

tradukis Roberto Kingsley, el Usono

am la granda ŝaĝulo Durvaso, enkarniĝo de Ŝivo, vojaĝis kaj renkontis feinon de la aero kun dolĉodora girlando. Durvaso petis ŝin, ke ŝi donu la girlandon al li kaj ŝi volonte plenumis la peton. Laodoro de la girlando tiel ekscitis lin, ke li komencis danci. Dum li dancis, la dio Indro alvenis, rajdante elefanton. Por plaĉigi la potencan dion, la ŝaĝulo prezentis la girlandon al li, kiu metis ĝin sur la kapon de sia elefanto. (Li faris tion pro falsa humileco.) La elefanto eksciĝis, prenis la girlandon per sia rostro kaj ĵetis ĝin sur la teron. Durvaso, vidante lian donacon tiel traktitan, koleriĝis kaj malbenis Indron kaj ĉiujn el la dioj, ke ili perdu ĉiujn potencojn, energiojn kaj riĉaĵojn.



De tiu tempo la potenco de Indro kaj la aliaj dioj komencis malpliigi iom post iom, kaj kvankam li pardonpetis, la kolero de la ŝaĝulo tamen estis nekvietbla. Ju pli malbonaj la efikoj de la malbeno fariĝis, des pli timis la dioj, ke la

demonoj superus ilin en la daŭra milito inter la dioj kaj la demonoj. Do ili fuĝis al Bramao sur Monto Meruo por peti helpon. Li diris, ke li ne povas helpi ilin, sed ke nur Viŝnuo povas. Bramao kondukis ilin al Viŝnuo, kaj preĝis al Li.

La preĝoj de Bramao plaĉis al Viŝnuo kaj Li konsilis la diojn proponi interpacon al la demonoj, por ke la dioj kaj demonoj kune buterigu la Oceanon de Lakto por ellasi la nektaron de senmorteco. Li diris, ke ili kolektu ĉiun specon de kreskaĵo kaj herbo kaj ĵetu tion en la Oceanon de Lakto. Li ankaŭ diris, ke ili prenu Monton Mandaron kiel buterig-stangon kaj la

serponton Vasukion kiel ŝnuron. Li avertis, ke la buterigado ellasus venenon kaj multe da mirindaj trezoroj, sed ke ili ne zorgu pri tio. Li ankaŭ promesis, ke la demonoj ne trinkus la nektaron de senmorteco.

Do la dioj obeis la vortojn de Viŝnuo kaj starigis interligon kun la demonoj. Post kiam ili ĵetis la kreskaĵojn kaj herbojn en la oceanon, ili ĉiuj komencis buterigi la oceanon. Viŝnuo mem enkarniĝis en giganta testudo por agi kiel pivoto. Unue el la akvo leviĝis la sankta bovino Surabhio, kiu estas senfina fontano de lakto kaj butero. Due el la akvo leviĝis Varunio, diino de vino. Trie leviĝis la Pariĝato, arbo de paradizo, kiu ravas la ĉielajn nimfojn, kaj kies bonodoraj floroj parfumus la tutan mondon. Kvare leviĝis la ĉielaj nimfoj perfekte belaj kaj sen egaluloj pri gracio. Kvine leviĝis la radia luno, kiun Ŝivo prenis kiel juvelo por sia krono. Sese leviĝis la terura veneno Halahalao.

La Halahalao gase disiĝis inter la dioj kaj demonoj kaj eksufokis ilin. Ambaŭ la dioj kaj la demonoj fuĝis al Bramao por peti helpon, sed li diris ke li ne povas helpi ilin, sed ke ili petu Viŝnuon. Kiam ili iris al Viŝnuo, Li diris ke Li ne povas helpi ilin, sed ke ili petu Ŝivon. Nun la sufoka haladzo disiĝis super la tuta mondo, kaj minacis mortigi ĉiun vivantan estaĵon. Finfine, la dioj kaj demonoj preĝis al Ŝivo por helpo. Ŝivo aŭdis ilian preĝon kaj glutis la Halahalaon. La edzino de Ŝivo, Parvatio, ektimis kaj tenis la kolon de sia edzo per ambaŭ manoj, kaj la veneno restis en lia gorĝo. Tial oni nomas Ŝivon, Nilakanthao (tiu kun la blua gorĝo) kaj Visakanthao (tiu, kiu tenis venenon en sia gorĝo.)

La dioj kaj demonoj reiris al la Oceano de Lakto kaj rekomencis buterigi ĝin. El la akvo leviĝis Lakŝmio, diino de prospero kaj bona sorto, sidanta sur lotuso kaj kun ŝi estis Danvantario, la kuracisto de la dioj, portanta urnon da nektaro. Kiam Lakŝmio aperis, la ŝaĝuloj raviĝis kaj la ĉielaj kantantoj laŭdkantis ŝin, kaj la ĉielaj nimfoj dancis antaŭ ŝi. La sankta rivero Gango sekvis ŝin, kaj la ĉielaj elefantoj verŝis puran akvon sur ŝin el oraj vazoj. La Oceano de Lakto donacis nevelkantan florkronon al ŝi, kaj la artistoj de la dioj ornamis ŝin per ĉarmaj ornamaĵoj. Tiel banita, vestita



kaj ornamita, la diino kuŝis sur la sinon de Viŝnuo kaj fikse rigardis la diojn, turnante sin for de la demonoj, kiuj rezulte estis mizeraj.

Sed la demonoj ne forgesis pri la nektaro de senmorteco. Ili ankoraŭ estis pli fortaj ol la dioj pro la saĝula malbeno, do ili komencis disputadi, kiu estu la unua trinkanto de la nektaro. Subite aperis rava belulino, Mohinio, kiu distris la demonojn. Mohinio estis enkarniĝo de Viŝnuo, sed la demonoj ne sciis tion. Ŝi volontis distribui la nektaron, kaj diris ke la demonoj kaj dioj enviciĝu por trinki. Mohinio unue trinkigis la diojn, sed la demono Rahuketuo maskis sin kiel dio kaj ŝteliris inter la dioj. La dioj Surjao, dio de la suno, kaj Ĉandrao, dio de la luno, sciigis Mohinion pri la ruzo kaj kiam la demono provis trinki la nektaron ŝi senkapigis lin per la diskforma armilo Sudarŝana-

Ĉakrao. Tamen unu guto da nektaro tuŝis la lango de Rahuketuo; lia senkorpa kapo fariĝis Rahuo, la ĉiam malsata serpento kiu gutas la sunon kaj kaŭzas la eklipson, kaj lia senkapa korpo fariĝis Ketuo, kiu estas saĝa kaj prudenta pro la manko de sia aroganta kaj fiero kapo.

Poste la dioj senmortaj pro la nektaro, batalis kontraŭ la demonoj kaj facile venkis ilin.

tradukis **Roberto Kingsley**, el Usono

Fonto: <https://www.reddit.com/r/Esperanto/comments/9ipfzj/>

hindua_mito_la_buterigado_de_la_oceano_de_lakto/

La pajla giganto

-- amuza mikrorakonto

Estis iam bonkora pajla giganto. Ĝi estis amiko de ĉiuj infanoj de la vilaĝo. Ĉiuj amis la bonkoran pajlan giganton. Sed iun tagon, dum varma somero, iu infanaĉo, por fanfaron pri sia kuraĝo, ŝtelis cigaredon el sia patro. Li sidis sur la rostro de la giganto, antaŭ ĉiuj aliaj infanoj. Li ekbruligis la cigaredon, forĵetante la alumeton malantaŭen kaj, jes, tiel okazis. Mi memoras, ke la fajro estis videbla de treeeee malproksime.




La polico arestis la infanaĉon kaj alportis lin al la policejo. Post kvin horoj li estis kondukata antaŭ la juĝisto, kiu taksis lin danĝera malsaĝuleto. Sed li estis

neplenaĝa infano, do la juĝisto ordonis lian tujan liberigon.

Tamen, li estis devigata konstrui pajlan ĉevaletan en la sama loko, kie antaŭe estis la giganto. "Se li ne faros tion", la juĝisto aldonis, "li estos forĵetita al la krokodiloj de la kastela ĉirkaŭfosaĝo, en la datreveno de lia plenaĝiĝo".

Jam libera, la infanaĉo rimarkis, ke ĉiuj, kaj infanoj kaj plenkreskuloj, malamis lin, kaj neniu volis helpi al li. Kaj ankoraŭ pli malbone, estis la fakto, ke la fajro bruligis la pajlon en la tuta lando. "Kiel mi konstruos

pajlan ĉevaletan, sen pajlo?", li pensis. Kaj decidis reiri vidi la cindrojn de la giganto. "Eble tie mi havos iun ajn inspiron", li flustris al si.



Kiam li alvenis tie, rigardante la ruinigitan pejzaĝon, li kortuŝite ekploris terure. Tiam larmo falis sur la cindrojn de la giganto, kaj subite, la pentanta infano ekvidis ian brilantan lumon inter la cindroj. La larmo estis turniĝita al luma verda diamanteto.

"Per tiu diamanteto mi povos vojaĝi al la najbarlando, aĉeti pajlon, kaj konstrui ne nur ĉevaletan, sed ankaŭ multajn aliajn pajlajn bestojn, inkluzive unu ankoraŭ pli grandan pajlan giganton", li ekkriis.

Li tre klopodis kaj tion faris. Kaj la datrevenan tagon de sia plenaĝiĝo ĉio estis preta. Li metis belan verdan pajlan stelegon sur la frunton de la giganto por memori la verdan diamanteton. Tiam, la infanoj de la lando denove ludis feliĉe, kaj ĉiuj homoj amis lin. Kaj la rakonto kaj la lando kaj la infano famiĝis en la tuta mondo. Kaj multaj homoj vojaĝis por viziti la belan landon de la pajla giganto kun la verda stelo.

verkis kunlabore

Maurizio Brucco, el Italujo

Carlos Ymbernon Torres, el Urugvajo

Fonto: <https://www.facebook.com/groups/esperanto.grupo/permalink/10156353195345289/>



elpensi novajn pretekstojn al ĝia neprofitemo, al ĝia libera disvolviĝo mem. Renkonto de iu homo kaj iu hundo ĉiam estas renkonto de du liberaj mensoj, de du specoj de digneco, de du senutiligaj moraloj. La plej senutiliga kaj plej romantika renkonto.

...

Tiu estis la plej kara inter miaj fratoj, mia reala frato, tiu, kiu ne perfidas, tiu, kiu neniam humiligas. La frato kiu amas, kiu helpas, kiu komprenas, kiu pardonas. Nur tiu, kiu suferis longajn jarojn da ekzilo en sovaĝa insulo, kaj, revenante inter la homojn, vidas sin evitegita tiel, kiel leprulo far ĉiuj tiuj, kiuj, iam, kiam estos mortinta la tirano, mienos kiel herooj pri l'libereco, nur ĉi tiu scias, kion povas esti hundo al homa estaĵo.

...

Tiu estis malgaja hundo seriozokula. Ĉiuvespere restadis ni longajn horojn sur la alta ventoplana sojlo de mia domo rigardantaj la maron. . . . Ni rigardadis la maron, flarante amaran odoron de l'salo, fortan kaj ebriigan odoron de la oranĝujoj, odoron de la kaprolakto, de la juniperaj branĉoj fajrigitaj en la fajrejoj, kaj tiun varman kaj profundan odoron virinan, kia estas laodoro de la Sicilia nokto, kiam ekaperiĝas la unuaj steloj pale el la fono de l'horizonto.

Kaj iutage oni kondukis min, manojn katenitajn, de Lipari en alian insulon, kaj de tie, post longaj monatoj, Toskanion. Febo sekvis min de malproksime, kaŝiĝanta malantaŭ la anĉovoplenaj bareloj kaj ŝnuregaro sur la ferdeko de Santa Marina, la malgranda vaporŝipo, kiu ĉiusemajne veturas de Lipari Napolon, kaj inter la fiŝ- kaj tomat-plenaj korboj sur la motorboato, kiu veturas ire kaj returne inter Napolo, Ischia kaj Ponza. . . . Mi po foje retrorigardis por vidi, ĉu Febo sekvas min, kaj mi vidadis ĝin laŭtanĝi la murojn, la voston kuntiritan inter la kruroj, en la Napolaj stratoj, de l'Immacolatella ĝis Molo Beverello, kun ravigan malĝojon en ĝiaj helaj okuloj.

En Napolo, malsupreniĝante inter la karabenistoj la strato Partenope mi vidis du virinojn alproksimiĝantajn je mi ridetante: ili estas S-ino Benedetto Croce kaj Minnie Casella, l'edzino de kara mia Gaspare Casella. Ili salutis min per la patrineca gracieco de la italaj virinoj, ŝovis florojn inter miaj mankatenoj kaj la manartikoj, kaj S-ino Croce petis al la karabenistoj, ke ili min konduku ien por manĝi. Mi estis nemanĝinta de du tagoj.

« Almenaŭ igu lin piediri ĉe la ombro », diris S-ino

... **m**ia hundo Febo, kiun mi estis akceptinta malsatmortantan sur la plaĝo Marina Corta, en insulo Lipari, kiun mi estis fleginta, nutrinta, vartinta en mia morta domo de Lipari, kiu estis mia unika kunulo en la daŭro de tiuj ekzilaj jaroj en tiu malgaja insulo, tiom kara je mia kor'!

Neniam amis mi virinon, fraton, amikon tiel, kiel mi amis Febon. Ĝi estis hundo tiel, kiel mi. . . . Tiu estis nobla estulo, la plej nobla kreito, kiun mi iam ajn renkontis dum mia vivo. Ĝi estis el tiu rara kaj delikata familio de leporhundoj, ĝisvenintaj el la bordoj de l'Azio kune kun la unuaj Ioniaj migradoj, kaj kiujn la Lipari-aj paŝtistoj nomas cerneghi. Tiujn-ĉi hundojn la helenaj skulptistoj skulptis sur la bareliefoj de la tomboj. « Ili forpelas morton », diradas la Lipari-aj paŝtistoj.

Ĝia felkoloro estis luna, roz- kaj or-kolora, la koloro de l'luno sur la maro, koloro de l'luno sur la malhelaj kaj glimaj folioj de l'citronujoj kaj oranĝujoj. . . . Ĝi estis de la koloro de l'luno sur la helena maro de Lipari. . . . La koloro de la morta luno, iom da tempo antaŭ l'matenruĝo. Mi nomadis ĝin Lunhundo.

Ĝi neniam malproksimiĝis de mi. Ĝi min sekvis kiel hundo. Mi jes diras, ĝi min sekvis kiel hundo. Ĝia ĉeesto en mia mizera domo Lipari-a, senĉese vipata de l'vento kaj maro, estis mirinda ĉeesto. Dumnokte la varmeta brilo de ĝiaj lunaj okuloj lumigis mian nudan ĉambron. Ĝi havis la okulojn iel palbluaj tiel, kiel la kolor' de la mar', ĉe la kliniĝanta lun'. Ĝian ĉeeston mi sentis tiel, kiel tiu de ombro. Ĝi estis kiel la respegulaĵo de mia spirito. Sufiĉis ĝia helpa ĉeesto, ke mi retrovis tiun malestimon je la homoj, kiu estas la precipa kondiĉo de la trankvilo kaj saĝeco en la homa vivo.

De ĝi, multe pli ol de la homoj, kun ilia kulturo, kun ilia gloramo, lernis mi, ke moralo estas senutiliga, ke ĝi estas al si mem sia celo, ke ĝi ne nur intencas savi la mondon (ne nur savi la mondon!) sed nur ĉiam

Croce.

Estis monato junio, kaj la suno frapadis al mi sur la kapon kiel per martelo.

« Dankon, mi bezonas nenion, mi diris, mi nur deziras, ke vi donu al mia hundo ion por trinki. »

Febo estis haltinta kelkajn paŝojn disde ni, kaj rigardegis la vizaĝon de S-ino Croce per preskaŭ suferiga intenseco. Estis la unua fojo, ke ĝi estis vidanta la vizaĝon de l'homa bonkoreco, de la kompato kaj de la afableco virinaj. Longtempe ĝi flaris la akvo, antaŭ ol trinki. Kelkajn monatojn poste mi estis translokigita Toskanion, en Lucques. Oni enkarcerigis mi en la malliberejon de tiu urbo, kie mi restis longtempe. Kiam mi eliris el ĝi inter gardistoj,

estonte kondukata al mia nova punezilloko, Febo estis atendanta antaŭ la pordo de l'malliberejo, malgrasa kaj kotokovrita. Ĝiaj helaj okuloj glimis je ia abomeninda mildo.

sendis **Roland Patteau**, el Francio

Mi sendas por Turka Stelo, esperantigitan paĝon de la itala verkisto Curzio Malaparte, el lia libro "la haŭto", kie li parolas pri sia leporhundo "Febo", kies nomo en la greka mitologio estis diino de la luno. Krom ĝia stila beleco, kaj forta kortuŝivo tiu teksto nin diras ion gravan pri moralo.

Esperanto en Usona Filmo

-- el Dana Esperantisto

La filmo Captain Fantastic ("Kapitano Mirinda", ankoraŭ montrata en danaj kinejoj) estas aktuala usona komedia dramo, en kiu ĉefrolas Viggo Mortensen. Ĝi premieris en la kinofestivalo Sundance en januaro kaj poste montrita en la filmfestivalo de Cannes.

En la arbaroj la gepatroj kreskigas ses infanojn per streĉa fizika kaj intelekta edukado. Pro malsano de la patrino, post jardeko la familio estas devigita forlasi sian paradizon kaj reintegrigi en la socion. Tio defias la ideojn de la patro pri la ideala vivmaniero.

Ĉiu el la ses infanoj parolas plurajn lingvojn. En parteto de la filmo la infanoj de la familio interparolas en Esperanto. Emilio Cid el Brazilo surretigis tiun eltondaĵon ĉe Youtube kaj Vimeo, vidu:

<https://youtu.be/mTj15L0Wv5s> kaj

<https://vimeo.com/188526059>

Fonto: **Dana Esperantisto** #2016-4



La ĉambro

-- verkis **Maria Nazaré Laroca**, el Brazilo

Mi sidas en blua boato ŝvebanta sub flava ĉielo: jen mia eta dormoĉambro. Ĝi varmigas min, kaj sopiras la aman volupton de la skarlata kovrilo. Tamen espero ne malfermas la fenestron senutile verda.

Du malplenaj seĝoj interparolas silente. Bildoj avide emas eksalti de la muroj kaj disfrakasiĝi sur la malcerteco de la planko. Nur la saĝa spegulo komprenas la solecon de la kapkusenoj.




La horoj min enuigas, kiel muŝoj. Kiu mi estas? Ĉu freneza poeto, kies versojn neniu legas? Ĉu pentristo kun malkompenita brilo en la okuloj? Kial mi estas ĉi tie? Kien mi iros? Finu vi mian rakonton...

verkis **Maria Nazaré Laroca**, el Brazilo

Fonto: <https://nazarelaroca.blogspot.com/2018/08/o-quarto-la-cambro.html>

Je la 3a kaj 8 minutoj la 9an de septembro okazis granda tertremo en la suda parto de Hokajdo.



En Japanio ofte okazas tertremoj. La registaro kaj sismologoj esploras, kie estas aktivaj faŭltoj, kaj faras mapon pri tiuj, sed tiu ĉi tertremo okazis, ne laŭ tiuj konataj faŭltoj, sed laŭ nekonata faŭlto. Tio signifas, ke

estas multegaj nekonataj faŭltoj en la japana insularo, sekve ĉie povos okazi grandaj tertremoj.

Mi vidis en televido la damaĝojn, kaj mi tre surpriziĝis pro nekredibla nombro da terfaloj kaŭzita de la tertremo. Ĉiuj montoj estis kvazaŭ skrapitaj per grandegaj ungoj (foto en la sekva paĝo). Vulkana cindro, kiu kovris la montojn, subenglitis pro la tremegoj kaj mortigis ĉirkaŭ 40 homojn, detruante iliajn domojn. Tio ne estas nur la problemo de Hokajdo, ĉar Japanio estas vulkana insularo kaj ĉie estas similaj terenaj formoj.



Terfaloj okazis en multaj lokoj.

Alia surprizo estis, ke okazis terlikviĝoj en la ĉefurbo Sapporo 50 kilometrojn for de la epicentro. Tie, pro la aktiviĝinta subtera akvo vojo sinkis kaj domoj kliniĝis.

La tertremo kaŭzis alian grandan problemon. Tio estas paneo de tri hidroelektraj

generatoroj de la elektra kompanio Hokajdo (mallongigita nomo, Hokuden) en la urbo Acuma, sub kiu okazis la tertremo. Tiu centralo liveris duonon de la bezonata elektro en Hokajdo. La paneo influis aliajn malgrandajn generatorojn, kaj sekve ĉiuj generatoroj



de Hokuden haltis. En la moderna vivo homoj ne povas vivi sen elektro.

Fabrikoj ne povis funkcii, bovostoj ne povis melki, sekve bovinoj mortis pro mammalsano, hospitaloj ne povis kuraci malsanulojn, resume ĉiuj funkcioj haltis kaj la ekonomio suferas multe. Eĉ nun elektra liverado ne estas sufiĉa kaj ne stabila, do la loĝantoj vivas en maltrankvilo.

Ankaŭ la nuklea centralo Tomari, kiun Hokuden posedas, suferis, perdinte la tutan elektran fonton el ekstere kaj dume ĝi devis dependi de memproduktita elektro. Feliĉe, tiam ĉiuj reaktoroj ne funkciis pro ekzamenado. Se ili funkciintus, tio kaŭzintus denove grandan nuklean katastrofon.



La nuklea centralo Tomari

En la nuklea centralo Tomari estas tri nukleaj reaktoroj.

	Sistemo	Ekfunkcio	Produktkvanto	Nuna stato
N-ro 1	PWA	1989.6.22	579 mil kW	ekzamenata
N-ro 2	PWA	1991.4.12	579 mil kW	ekzamenata
N-ro 3	PWA	2009.12.22	912 mil kW	ekzamenata

* **PWA** : premakva reaktoro. Ĉiuj nukleaj reaktoroj en Fukuŝima estas alispecaj bolakvaj reaktoroj.

Mia amiko pledos en la tribunalo

Kontraŭ ĉiuj nukleaj centraloj en Japanio estas protestaj agadoj. Ankaŭ en Hokajdo estas movado kontraŭ la nuklea centralo Tomari kaj oni akuzas Hokuden-on, postulante forĵeton de tiu centralo. Mia konato, s-ino Higuĉi Minako, kiu agadas dekomence kontraŭ tiu centralo, pledos en la tribunalo Hokajdo la 9an de oktobro. Ŝi sendis al mi informon pri tio kaj ankaŭ la tekston por ŝia pledado. Ŝi prezentas sin jene:

Mia nomo estas Higuĉi Minako. Mi respondecis pri la informilo de « Societo agadanta por forĵeti la nuklean centralon Tomari » ekde junio 2011 ĝis junio tiun ĉi jaron.

Kiam ni decidis meti la kazon en la tribunalon, ne estis sufiĉe da kunlaborantoj, do mi kaj aliaj du laboris per telefono kaj retmesaĝoj por tiu laboro. Kiam ni sukcesis kolekti 612 homojn kiel akuzantojn, mi estis

tre ĝoja. Nun ni havas 1233 akuzantojn.

Mi neniam forgesas la akcidenton en Ĉernobil en 1996. Eĉ en fora Hokajdo falis nukleaĵoj. Kelkajn tagojn post la akcidento mi naskis la unuan bebon. Por protekti ĝin kaj nin, kiel zorge mi elektis manĝaĵojn! Por disvastigi informon pri la danĝero de la nuklea akcidento, mi komencis eldoni etan informilon « Ginga Cuuŝin » (Informilo Galaksio), kaj tiun ĉi jaron estas la 30-jariĝo de la informilo.

Mi ne estas sperta en publika parolado, sed kiel unu el tiuj, kiuj spertis la ĉi-fojan senelektran, tute malluman vivon, mi parolos pri la temo "La ĉi-foja tertremo en Hokajdo igis pli klara la danĝeron de la nuklea centralo Tomari". Ĉiuj povos ĉeesti ĉe la juĝado. Mi atendas vian ĉeeston.

Teksto de ŝia parolado en la tribunalo

La ĉi-foja tertremo en Hokajdo igis pli klara la danĝeron de la nuklea centralo Tomari Akuzanto Higuĉi Minako

Frumatene la 6an de septembro okazis tertremo kun sisma intenso 7 (magnitudo 6,7) en la orienta distrikto de Iburi, kaj la elektra kompanio Hokajdo (Hokuden) perdis funkcion liveri elektron en la tuta Hokajdo. Mi loĝas en la urbo Ebecu, 60 kilometrojn for de la epicentoro Acuma, sed al mia domo ne venis elektro dum du tagoj. Trafiko ne funkciis. Vendejoj estis fermitaj. Ni ne povis aĉeti manĝaĵojn. Informoj venis nur per radioaparato, kiu apenaŭ funkciis per baterio. Mi unuan fojon spertis teruron de tute mallumaj stratoj sen trafikaj signaloj. Ĉi-foje mi parolos nur pri tio, kion mi rimarkis en tiuj mallumaj noktoj.

Pro la tertremo hidroelektraj generatoroj n-ro 2 (600 mil kW) kaj n-ro 4 (700 mil kW) de Hokuden ĉesis funkcii pro damaĝoj al tuboj, kiuj transportas varmegan vaporon. Kaj post 17 minutoj la generatoro n-ro 1 (350 mil kW) ĉesis funkcii. Pro tio perdiĝis duono de la bezonata elektro en Hokajdo, kaj perdiĝis ankaŭ ekvilibro inter la aliaj generatoroj, sekve okazis tuta senlumiĝo en la tuta insulo Hokajdo.

* La generatoro n-ro 3 jam antaŭe estis forĵetita.

Nukleaj reaktoroj, tiutempe ne funkciantaj, en la nuklea centralo Tomari, perdis elektron venintan el ekstere dum 19 horoj kaj duono. Dume urĝokazaj generatoroj funkciis kaj malvarmigis nukleajn brulaĵojn en la akvujoj. Se tiuj generatoroj paneintus, tiuj brulaĵoj povintus fariĝi kritaj.

En tiu tertremo sisma intenso en Tomari estis nur 2. Eble Hokuden antaŭvidis eventualan grandan tertremon, kiu povus perdiĝi eleksteran elektron, sed ĝi tute ne antaŭvidis, ke pro tertremo fore okazonta

kaŭzos senelektriĝon en la tuta Hokajdo, nek ke la nuklea centralo perdos eleksteran elektron dum multaj horoj. Hokuden pledadis en tiu tribunalo, ke ĝi prenas/ is ĉiajn rimedojn kontraŭ ĉiaj danĝeroj por gardi la reaktorojn, sed ĝi tute ne antaŭvidis, ke la elekstera elektro tiel facile perdiĝos.

Se la nukleaj reaktoroj funkciintus tiun tempon, kio okazintus? Malvarmigi uzitajn brulaĵojn en akvujoj kaj malvarmigi funkciantaj reaktorojn estas tute malsame. Antaŭ sep jaroj, pro la granda cunamo en Fukuŝima kvar reaktoroj sinsekve perdis elektran fonton kaj detruigis, disĵetante nukleaĵojn en la orienta Japanio. Fukuŝima-anoj perdis trankvilan vivon. Ĉu ili reakiris la trankvilan vivon? Ankoraŭ la akcidento ne finiĝis. Spertinte senelektran vivon, mi forte konstatis, ke ni ne povas vivi sekure kaj trankvile kun nukleaj centraloj.

La due grava afero dum tiu ĉi tertrema katastrofo estas, ke oni havis 17 minutojn inter la paneoj de la dua kaj la kvara generatoroj kaj tiu de la unua generatoro. Multaj esploristoj menciis, ke Hokuden povus eviti tutan senelektriĝon, se ĝi ekvilibrigus ofertadon kaj mendadon de elektro, malfunkciigante generatojn en aliaj lokoj. La kompanio tute ne estis preta je krizaj okazoj. Ĝi ne havas kapablon teni la nukleajn centralojn sekuraj. Tio fariĝis tute klara al ĉiuj, okaze de la ĉi-foja tertremo.

La tria grava afero estas, ke la ĉi-foja tertremo okazis en ne antaŭvidata loko. Ĝi okazis 37 kilometrojn profunde kaj kaŭzis grandegajn terfalojn. En la maro apud la nuklea centralo Tomari troviĝas simila faŭlto kiel tiu en la urbo Acuma. Se okazos tertremo apud Tomari, ĝi trafos la nuklean centralon, kaj donos grandan damaĝon al ĝi, rompante tubojn per vertikalaj tremetoj.

Fine mi legos parton de mia eseo, kiu aperis en la libro « Leteroj al Hokuden » antaŭ 29 jaroj.

« Se okazos nuklea akcidento en Tomari, la unuaj viktimoj estas infanoj. Tia akcidento malpurigos la maron, la aeron kaj la teron, kaj tra poluitaj manĝaĵoj radioaktiveco akumuliĝos en iliaj korpoj.

Mi iam vizitis la vilaĝon Tomari. Tie estis tre bela marbordo. Kial oni tie konstruis la nuklean centralon? Mi rememoris la golfon Ŝiranui en la gubenrio Kumamoto. Tie estis bela kaj fekunda maro. En tiun maron la nitrogena fabriko forĵetis venenan hidrargon. Tiu ne estas videbla, nek flarebla, same kiel radioaktivaĵo, tial la loĝantoj, tute ne rimarkante la danĝeron, manĝadis poluitajn fiŝojn, kaj suferis pro malsano nomata "Minamata malsano". Eĉ beboj naskiĝis malsanaj. ... Vi forĵetu la nuklean centralon Tomari, se vi amas vian familion. »

Se la nuklea centralo funkciintus, kiam okazis la

tertreto, povintus okazi granda akcidento. Mi postulas, ke la danĝera nuklea centralo Tomari estu tuj forĵetita. Mi esperas, ke la juĝistaro verku ĝustan verdikton.

(Fino de la teksto)

Kiam mi aŭdis, ke la ekstera elektro perdiĝis, mi tre timis. Certe la nuklea centralo havas sian propran generatoron por produkti elektron, sed por tio oni bezonas benzinon aŭ pezan oleon. Ĉu Hokuden havas sufiĉe da rezervo? Kiom da tagoj ĝi povos produktadi elektron?

Kaj alia timo estas, ke tertremoj povas rompi tubojn en la centralo. Nukleaj reaktoroj estas ligitaj per multege da grandaj kaj malgrandaj tuboj. Se tiuj estos rompitaĵoj, okazos katastrofo. Vidu la foton en la sekvanta paĝo. Post grandaj tertremoj oni ofte trovas grandajn fendojn sur la tero. Se tia fendo okazos sub la nuklea centralo, nukleaj reaktoroj ne povos rezisti. Kaj tian akcidenton ni jam spertis en la nuklea centralo Kaŝiŭazaki-Kariŭa en la gubernio Niigata en julio 2007.



Ĉiuj timas eventualan nuklean akcidenton, sed la registaro kaj la industria mondo persiste provas funkciigi ĉiujn nukleajn reaktorojn. Kiam okazas grandaj tertremoj, la unua demando aperanta en la kapo de multaj homoj estas « Ĉu la nuklea centralo ne estis difektita? » Ni ne plu volas vivi kun tiu timo.

Maldekstra foto : Fendo sur rizkampo kaŭzita de la tertremo en Kumamoto en 2016.

Dekstra foto : Detruita tereno en la nuklea centralo Kaŝiŭazaki-Kariŭa en Niigata kaŭzita de la tertremo en 2007. TEPCO riparas ĝin kaj provas refunkciigi tiun difektitan centralon.

verkis **Hori Jasuo**, el Japanio

Ovo de Kolumbo

Dum unu tuta monato mi klopodis transmeti la fotojn de mia Canon en la memoron de la komputilo. Vi rajtas ridi pri mi, sed tio estis tuta monato de suferado kaj defio al pacienco. Mi rezignis. Mi serĉis komputilriparejon kaj transdonis al tiuj geniaj junuloj la ridindan taskon. Mi perceptis sur iliaj lipoj diskretan mokrideton:

- Kompatinda onĉjo!...

Por mia surprizo, la afero ne prosperis. Ili faris plej ellaboritajn manovrojn, enŝutis plej komplikajn aplikaĵojn, plenumis plej kreopovajn informadikajn akrobataĵojn - kaj la fotoj kaprice rifuzadis transsalti el unu maŝino al la alia. Ili penadis dum du horoj - kio, laŭ mia kronologio de analfabeto informadika, ekivalentis al tiu monato, kiun mi perdis, dum mia klopodado. Tiam, estis mia vico montri per la lipoj diskretan mokrideton, naivan venĝon, kiun ili tute ne perceptis.

Kaj alvenis la estro de la komputilriparejo, por vidi, kial haltis ĉiuj aliaj laboroj kaj mendoj. Oni montris al li la problemon kaj li, sen ia rideto, klakis ie trifoje kaj jen transiris ĉiuj fotoj al sia nova loĝejo. Poste li senpacience kuntiris la brovojn kaj ordonis:

- Nun, al la laboro!


Mi prenis miajn aĵojn por foriri. Antaŭ tio, mi komentis al la junuloj, kiuj ankoraŭ estis konsternitaj pro la fiasko:

-- verkis Paulo Sérgio Viana, el Brazilo

- Vera ovo de Kolumbo!
Ĉiuj rigardis min, duone mire,
duone kolere:
- Ovo de kio, onĉjo?!
- Forgesu.
Kaj mi rapide foriris.



verkis **Dr. Paulo Sérgio Viana**, el Brazilio




Fonto: <https://>

blogdopaulosergioviana.blogspot.com/2018/08/ovo-de-colombo.html

Ĥristina Kozlovskaja (ukraine *Христина Козловська*) naskiĝis en 1989 en Ivano-Frankivskaja provinco de Ukrainio. Ŝi estas verkistino, poetino kaj ĵurnalistino. Ŝiaj diversaj verkoj estas tradukitaj en Esperanton de Petro Palivoda, kaj ili aperis en diversaj Esperantaj revuoj.



simile al tio, kiel oni trinkas akvon post solida nutraĵo por ne glutsufokiĝi. Kompreneble, akvo estas vivonecesa, oni ĝin ĉiam bezonos, tamen ĝi ja estas tia ... tia seneca, sen odoro kaj sen gusto. Amo por Nina estis akvo. Amo estas io sen odoro kaj gusto. En sia vivo ŝi neniam rimarkis ĝin. Sed eble amo falis sur ŝin kiel pluvo per etaj porcioj? Sed tiam amo estis ensorbata per ŝia korpo, kaj Nina denove nenie rimarkis ĝin. Tamen Nina jam kutimiĝis, ke homoj ofte agas tiamaniere rilate al amo, provas profiti de ĝi. Tial ĉion gravan por si en la artikolo ŝi ekvidis, kaj la negravan ekvidis kaj forgesis.



Kaj ĉio komenciĝis tute ne banale, ne tiel, kiel ĉe la plimulto de homoj. Ne pro la deziro donaci neprofiteme al iu amon kaj zorgadon kaj same akcepti ilian amon kaj zorgadon. Ĉar delonge venis al ŝi kompreno, ke sen ŝia amo ne nur la mondo, sed ankaŭ la koro de eĉ unu persono ne haltos. Ĝis nun ŝi ne havis okazon renkonti homojn, kiuj postulus de ŝi tiun amon. Kaj interna nekomprenebla, probable denaska asketismo ne permesis vidi bezonon je aĵoj aŭ sentoj, kiujn ŝi ĝis tiam tute ne bezonis. Sekve temis pri io alia, multe pli pragmata. Temis pri helpo, antaŭ ĉio al ŝi, kaj poste ankaŭ pri oportuna kunekzistado. Sed komence estis artikolo en loka gazeto.

Kiel katinoj kuracas homojn

... ili povas ĝuste determini malsanan lokon de homo kaj sanigi ĝin ... kuŝiĝas sur malsanan korpoparton, varmigas kaj masaĝas ĝin ... kreas specialan energian fonon ... senigas je depresio, sendormeco, hipertensio, artrito kaj eĉ infarkto, ... kuracas ginekologiajn malsanojn kaj problemojn de la spirsistemo ... kontribuas al pli rapida cikatriĝo de vundoj, forigas kapdolorojn ...

Ŝi simple fiksigardis la artikolon legante la liniojn kun la listo de malsanoj, kiujn tiel facile povas kuraci simpla kato, kaj nur flugrigardis tiujn liniojn, kie temis pri la amo, kiun tiuj bestoj donacas al siaj mastroj, kaj pri tio, ke tiu kuracado okazas plej probable sur la psikologia nivelo, kaj ke tiu longa kaj klopoda procezo dependas ankaŭ de la mastro, kiu devas agordi kontakton kun besto, se eblas tiel diri: fidi ĝin. Tiuj lokoj en la teksto pri amo ŝi perceptis kiel ĝeneralan fonon de ceteraj gravaj faktoj. Ŝajnis, ke "amon" homoj enŝovas ien ajn por fuŝmiksi tekston ŝtopitan per datoj kaj eventoj, eble, ke ĝi ne ŝajnu tro malfacila por legado kaj posta asimilado (digestado?). Iom



Akvarelo de Natalia Pendjur

Jam sekvatage Nina iris hejmen ne sola. Enkorbe kuŝis silentiĝinta timigita katinino. Plenkreska individuo, nenuokaze katido. Nina ne havis eĉ plej etan deziron klopodi ĉirkaŭ la katido, manĝigante ĝin el boteleto, lerni ekskrementi en la sablon kaj, Dio gardu, ludi kun ĝi aŭ ĝenerale dediĉi al ĝi pli da atento ol necesas por kvietaj kaj paca loĝado sur komuna teritorio. Do ŝi trovis tion, kion ŝi volis - jam ne junan katinon, kiun ne plu favoris ŝia mastrino, amikino de Nina, aŭ, pli ĝuste, koleginino. La katinino jam delonge ĉesis esti freneza amuza kreitaĵo, kiu tutajn tagojn kuradis tien kaj reen tra la loĝejo, gratis tapetojn, pendis sur kurtenoj, amuzante per tio domloĝantojn, anstataŭe ĝi estis trankvila, indiferenta, iomete pigra kaj, kiel ŝajnis al ĉiuj, maljuna.

Survoje Nina vizitis vendejon kaj aĉetis senelekte iun katan nutraĵon, pretiĝante por plej malbonaj situacioj. Ŝi jam imagis al si terurajn bildojn de nekredbla sopiro de la besto al sia ĝisnuna hejmo. Al ŝi ŝajnis, ke ŝi jam aŭdas akran senesperan katan hurladon kaj eĉ supozis, ke finfine ŝi devos redoni la katinon.

Sed la vivo komencis donaci al Nina siajn

misterojn. Komence donaci kaj poste jam malkovri ilin. Kaj la unua mistero iĝis Floro. Tiel nomiĝis la katino, kiun Nina ĝuste nun estis portanta en sia korbo en la loĝejon. Tiel ĝi nomiĝis denaske, kaj en la kapon de Nina neniam venus la penso nomi la katinon alie. Unue, Nina estis nekreema homo. Ŝia nekreemo atingis tiajn altaĵojn, ke simple elpensi nomon por la katinjo kaŭzis neimageblajn mensajn suferojn. Komprenoble, al ŝi venis la penso pri io simila al Ronrona, kaj Ronrona ĉiam kaj ĉie asociiĝis kun infanverseto pri Katinjo Ronrona (kie vi estis ...) kaj pro tio ŝiaj suferoj eĉ pli intensiĝis. La virino ne ŝatis rememori sian infanecon.

Nina elkorbigis la katinon kaj mem sidiĝis en malgranda kuirĉambreto. Ŝi rigardis vake, frotante sian dekstran genuon, kiu ankoraŭ survoje ekbrulis. Kaj ferminte la okulojn ŝi kvazaŭ falis tra kelkajn etaĝojn en varman sukan someron, kiu estis plena de varmaj sukaj pomoj en la ĝardeno de ŝia avo. Jen estas la pomarboj de la avo, kaj jen tiuj de la najbaro, kaj kiu dubus, ke sur la najbaraj pomarboj pomoj estas pli bongustaj. Jen estas la barilo inter la ĝardenoj, kaj jen super la barilo estas ŝi, ruĝhara longkrura bubino - staras sur la maldika branĉo, tenas sin per ankoraŭ pli maldika maneto je alia branĉo, kaj per la dua tiras sin al tiuj pli bongustaj pomoj. Kaj tiam okazis tio, kio devas okazi en ĉiu paradizo, eĉ pli, se temas pri pomoj. Poste estis dolore kaj estis larmoj.

Kaj la najbaraj knaboj ridegis ankoraŭ, vidante ŝian sportpantalono, kiu minacis malkudriĝi, tiritan sur gipsobandaĝon ĉe la dekstra kruro. Kaj ĝuste la dekstra kruro, kaj pli ĝuste la dekstra genuo, reaganta al ĉiuj veterŝanĝiĝoj, estis destinita al Floro, al ĝiaj nekredeblaj kurackvalitoj.

Sed tempo pasis, la genudoloro ne ĉesis, kaj la katino plu sidis sur sia loko kaj ŝajnis jam dormeti. Nur nun Nina konsciis ridindecon de la situacio. Kiel povis ŝi, adolta virino, kredi la artikolon, kiu ŝajne estis destinita nur por okupi superfluan spacon sur la paĝo? Sed tamen Nina decidis provi alian varianton. Ĉu eble Floro sidas simple tro malproksime kaj ne sentas iujn tiajn ondojn, kiuj devus eliri de la malsana loko? Nina prenis la katinon kaj sursofigis ĝin apud si. Kaj poste - sur sian malsanan genuon. Floro dum kelkaj sekundoj vere ne moviĝis, sed poste trankvile stariĝis kaj kuŝiĝis, fleksinte sub si la kruojn sur la rando de la sofo plej for de Nina.

Tiun tagon Nina sentis sin tre amare. Ŝi metis sur tiun katoterapion sian lastan esperon por resaniĝo. Nu, se ne por resaniĝo, do almenaŭ por dolorkvietiĝo, sed ĉio montriĝis vana. Jen tiel ili sidis, ĉiu en sia angulo, du solecaj estaĵoj, indiferentaj por ĉiuj kaj indiferentaj al ĉio kaj dume indiferentaj unu al la alia.

(daŭrigota)

Idelaj Ĝardenoj

Igi homojn idealismaj estas tre malfacila afero. Kutime oni ne sukcesas. Ŝajnas ke idealo kreskas mem en onia menso. Kaj ne en la menso de multaj. Ekzistas nur kelkaj inter ni kiuj kapablas stimuli aliulojn al idealismo kaj tiam precipe per propra ekzemplo.

En la komenco de la antaŭa jarcento idealistoj starigis sian propran komunan "landeton" en Usono por praktiki egalecon kaj senregistarecon kaj vivi tiel kune farante laborojn por la komunumo, ĉiu kion li aŭ ŝi kapablis. En la komenco ĝi estis sukcesa, ĉar ĉiuj estis idealistoj kaj deziris sukceson, kaj ankaŭ ĝuis tian senmastran kaj helpeman atmosferon. La landeto, nur kelkajn akreojn, devis resti parto de Usono, sed tio ne multe gravis. Pli gravis la rilatoj inter la komunumanoj, ne nur pri la kunlaborado sed ankaŭ pri la rilatoj inter la du seksoj. Ĉi lastaj rilatoj devis esti same liberaj, sed praktike dependis de aliaj, naturaj, inklinoj, kaj do montriĝis la plej malfacilaj idealismigi. Sed ankaŭ la homaj karakteroj mem kaŭzis frotojn inter la partoprenantoj, sendube originaj al iliaj antaŭaj vivmanieroj. La usona landeto nomiĝis "Walden".

Ankaŭ en Eŭropo oni penis starigi tiajn

verkis Marcel Leereveld, el Aŭstralio

"kolonietojn", sed lokaj kaj naciaj kutimoj kaj leĝoj malfaciligis tion. Tamen unu el miaj avoj penis fari tion. Li, kiam juna, jam estis anarĥiisto, kaj havis amikon samidealeman. Ĉar ambaŭ origine estis meblistoj, farantaj kaj riparantaj meblojn, ili jam antaŭ "Walden" starigis malgrandan komercon kun kvaro da laboristoj por fari meblojn. Tio estis sukcesa. La du viroj estis leĝe la posedantoj de la firmaeto, kaj metis en ĝin la necesan monon. Nu, post pluraj jaroj venis "Walden", kaj mia avo kaj lia amiko entuziasmiĝis kaj decidis fari la samon. Ili do leĝe ŝanĝis la posedon de sia duo al ilia seso, sen ke la kvar laboristoj bezonis enmeti financon. Mia avo kaj la amiko pensis, ke la propeco de la firmao igus la kvar laboristojn labori same konsciencie kiel ili, devige, faris antaŭe. Sed kio okazis? La du antaŭaj mastroj daŭrigis forte labori por ricevi financojn por vivi. La ses ĉiuj ricevis la saman salajron, ne depende de kiom ili laboris. Sed la kapitalismaj pensoj de la kvar laboristoj ne kapablis igi ilin entuziasmaj por forte labori, sed, ĉar ne plu mastrati, faris malpli kaj malpli da laboro kaj ĝuis uzi la labortempon por ludi. La



idealaĵo do fiaskis, ĉar la firmaeto perdis tiom da mono ke ĝi bankrotis. Tiel la antaŭaj estroj kaj la kvar laboristoj ĉiuj perdis ĉion. Verŝajne pro tio mia avo poste fariĝis komunisto (leninisma). Kaj devis vivi per senlaborula pago registara. Tamen post la dua mondmilito (la metalkompanioj zorgos ke estos almenaŭ tria) oni reinventis Walden-ajn kolonietojn

(kibutzim) en Izraelo, kelkaj el kiuj evidente fartis pli bone, eĉ ĝis nun.

verkis **Marcel Leereveld**, el Aŭstralio

Fonto: **Aŭstralia Esperantisto** AE-383

La salamandro kiu neniam iĝas plenkreska

-- el blogo Scivolemo

Neniu amfibio en la mondo estas tiom populara kiel la aksolotlo. Pro ĝia amuza aspekto kaj relative facila prizorgado, ĝi estas ofte vendata kiel hejmbesto. Aldone, ĝi estas bredata por sciencaj esploroj en diversaj fakoj kiel embriologio. Ŝati aksolotlojn ne estas nova afero tamen. La aksolotlo estis historie multe respektata de la indiĝena popolo de la regiono. Ĝia nomo venas el la Naŭatla lingvo kaj referencas al la dio Ŝolotlo (*En la Naŭatla lingvo, oni uzas ŝ-sonon anstataŭ ks-sonon. Malgraŭ tio, la vorto aksolotlo havas ks-sonon en Esperanto pri la influoj de aliaj lingvoj*), la dio de morto, kiu ŝanĝis sin al aksolotlo por ne esti oferata de la aliaj dioj. Dum longa tempo, homoj kaj aksolotloj povis kune vivi. Oni kultivis plantojn sur la akvo sur specialaj platformoj el akvaj plantoj kaj koto. Tio donis al la aksolotlo lokon plena je oksigeno por vivi kaj reprodukti sin, dum la produktoj iĝis pli valoraj, pro tio ke la ĉeesto de aksolotloj garantiis ke la akvo estis bonkvalita. Aldone, aksolotloj estis facila kaj bona nutraĵfonto. Post la alveno de Eŭropanoj, tiu vivstilo estis minacata kaj ankaŭ tiu de la aksolotlo. Ekde 1607, oni komencis konstrui kanalojn por eviti ke la lago inundus la novan ĉefurbon. Tiu sistemo nur iĝis pli kaj pli kompleksa kaj malgrandigis la habitaton de la aksolotlo. En la dua

indiĝena popolo de la regiono, pro la kultura rolo de la besto. Laŭ la legendoj, la malapero de la aksolotlo ankaŭ signifus la malaperon de la popolo.

duono de la dudeka jarcento, oni interŝanĝis la antaŭan akvofonton de la lago per purigita rubakvo. Tio poluis la akvon kaj igis ĝin eĉ malpli alloga al la sentema besto. Laste, aksolotloj apenaŭ havis naturajn malamikojn, ĝis homoj enkondukis predantajn fiŝojn en la sepdekaj kaj okdekaj jaroj. Nun la iam abunda amfibio estas sur la limo de formorto kaj estas reprezentata de nur kelkaj individuoj en ĉiu kvadratkilometro. Se la aksolotlo formortus, tio estus terure bedaŭrinda. Kompreneble ĝi malbonus por la ekosistemo, sed ankaŭ por sciencistoj, ĉar malgraŭ la sukcesa bredado de aksolotloj, oni konservu la sovaĝan populacion por pli da genetika diverseco. Laste, la malapero estus malbona por la

La solaj naturaj habitatoj de la aksolotlo estas la lagoj de Chalco kaj Xochimilco. El la du, nur eta parto de la lago de Xochimilco restas, ĉar la resto estis forpumpita. Ili estis altaj montolagoj kun danĝeraj kondiĉoj surtere, kio igis la subakvan vivon pli alloga. Tio povus klarigi kial resti en la larva stadio, kiu estas pli bone adaptita al vivi en akvo, estus avantaĝo al la

salamandro. Malgraŭ tio, la regiono ja havas populacion de proksima parenco de la aksolotlo, *Ambystoma tigrinum*, kiu ja metamorfozas. Ĉiukaze, la plej grava kaŭzo de la "neotenio", la konservado de larvaj ecoj, estas manko de jodo en la akvo. Same kiel homoj, aksolotloj kaj aliaj salamandroj bezonas jodon por produkti specifajn hormonojn, kiuj gvidas ilian kreskon. Tio signifas ke jodo estas esenca por la metamorfozo. Dum longa tempo, oni ne sciis ekzakte kiun lokon la aksolotlo havas en la arbo de vivo, sed per injekti la hormonojn, kiujn ĝi bezonis por metamorfozi, oni sukcesis krei plenkreskajn




La blankoj klare videblas malantaŭ la kapo



^ La antikva dio Ŝolotlo

konservu la sovaĝan populacion por pli da genetika diverseco. Laste, la malapero estus malbona por la

aksolotojn, kiuj multe aspektis kiel la antaŭe menciita *Ambystoma tigrinum*. La du eĉ povas krei idojn kune. Malgraŭ tio, ili ankoraŭ estas tiom malsamaj, ke sciencistoj distingas inter du malsamaj specioj.



La vivo de *Ambystoma tigrinum*, kiu ja metamorfozas

Kompare kun aliaj amfibioj, aksolotloj povas iĝi grandaj. Maksimume ili atingas 30cm, dum la averaĝo estas ĉirkaŭ 15cm. Tio ne estas la nura afero pri ili kiu grandas tamen, pro tio ke ankaŭ

iliaj ĉeloj kaj ovojn estas tre grandaj. Tio igas ilin tre taŭgaj objektoj pri embriologiaj studoj. Oni povas facile pristudi la grandajn, travideblajn embriojn. Malsamaj ĉeloj povas ankaŭ havi malsamajn pigmentojn, kio montras kiuj ĉeloj iĝas kiuj korpocpartoj. En la komenco de la dudeka jarcento, aksolotloj estis gravegaj por studi la funkcion kaj kreskon de organoj. Tiel ili multe helpis kun la serĉo al la kaŭzo de malsanoj kiel spina bifida en homoj. Alia eblo estas genetike modifi la aksolotlon, por ke ĝiaj ĉeloj produktu GFP, proteino, kiu estas uzata de meduzoj por elsendi verdan lumon. Unu el la aplikoj de tia modifado, estas ke oni povas igi kancerajn ĉelojn brili verde. Tiel oni povas tre facile vidi kiel la kancero disvastiĝas en la korpo.



Aksolotlo, kiu produktas la proteinon GFP

Alia kvalito de la aksolotlo, kiu povus helpi onin kuraci homojn, estas ilia nekredebla talento de regenerado. Kiam aksolotlo perdas kruron,

kiu povas relative facile okazi kiam oni havas plurajn, la tuta kruro povas rekreski tiel, ke oni ne vidas ke ĝi iam estis for. Pluraj organismoj, inkluzive homoj, iomete havas tiun kapablon en kelkaj lokoj, sed aksolotloj specife bonaj je ĝi. Ĝia sekreto estas ke ĝi ŝanĝas la identecon de siaj ĉeloj. La ĉeloj ĉirkaŭ la vundo iĝas pluripotentaj, kio signifas ke ili povas iĝi pli-malpli ajna ĉeltipo, kiun la kreskanta korpocparto bezonas. Tiel la nova korpocparto aspektas kvazaŭ la aksolotlo eskapis la ovon kun ĝi. Homoj povas iomete regeneri sin, sed kiam oni perdas fingron, ĝi neniam rekreskos. Studi ekzakte kiel aksolotloj faras ĝin estas do interesa, ĉar oni eble povas krei kuracmetodon el la novaj informoj. Eble oni ne baldaŭ sukcesos

kreskigi tutajn korpocpartojn, sed oni havas altajn atentojn kiam temas pri paralizo, la sana kreskado de organoj kaj riparado de aĝdamaĝo. Grava diferenco inter la aksolotloj en laboratorio kaj iliaj sovaĝaj amikoj estas la koloro. En la naturo, blankaj aksolotloj estas ege raraj, dum ili estas la normo en la laboratorio. La kialo estas ke ili havas du kopiojn de specifa geno, kiu kaŭzas ke ili ja produktas pigmentojn, sed ke ili ne videblas en la haŭto. Tio signifas ankaŭ ke ili ne estas albinaj. Veraj albinaj aksolotloj ankaŭ ne havas pigmenton en la okuloj. Kvankam la laboratorioj aksolotloj ne havas pigmenton, ili ja estas iom rozkoloraj. Tiu koloro rezultas de la sango kiu trairas la haŭton. Sovaĝaj aksolotloj kutime estas multe malpli helaj aŭ eĉ nigraj kaj foje havas makuletojn. Kiel hejmbestoj la blanka variaĵo estas plej populara, pro tio ke ĝi aspektas amuze, sed ankaŭ malhelaj aksolotloj estas vendataj.

Eble eĉ pli stranga kapablo ol regenerado, estas la akceptado de hazardaj korpocpartoj. Oni povas preni la kruron de unu aksolotlo kaj senprobleme ligi ĝin al alia individuo. En homoj kaj aliaj bestoj, la imuna sistemo kontraŭbatalas ĉelojn, kiuj malsimilas al la propra korpo. Tial oni uzas organojn de proksimaj parencoj por greftado. Aksolotloj ne reagis tiel, kio signifas ke oni povas libere interŝanĝi multajn organojn. Grefte, la organoj eĉ funkcias kaj kreskas. Se oni fortranĉas la kruron de blanka aksolotlo kaj surmetas eĉ nur kelkajn ĉelojn de lumanta aksolotlo, tiuj ĉeloj povas kreski kaj formi tute novan, lumantan kruron. Eĉ pli freneza ekzemplo estas la eksperimento en kiu oni greftis la kapon de juna aksolotlo sur la dorson de alia aksolotlo. La kapo vivis kaj kreskis kaj reagis simile al eksteraj faktoroj kiel la kapo de kutima aksolotlo, sendepende de la alia kapo. Poste la Frankenŝtejnaĵo vivis dum 65 semajnoj.

Kelkaj eksperimentoj estis pli etike ĝustaj ol aliaj, sed ĝenerale, la plej pristudata amfibio de la mondo multe helpis homaron. Pro la aksolotlo, oni pli bone komprenas kiel embrioj



Aksolotlo kun aldona brako ĉe laboratorio de UCI

kreskas, kiel specifaj malsanoj funkcias kaj kiel unu el la plej strangaj bestoj surtere vivas. Oni facile bredas aksolotlojn en laboratorioj, do nek sciencistoj, nek entuziasmuloj bezonas timi perdi ĉi tiujn eksterterulojn, sed ankoraŭ la sovaĝa aksolotlo estas altvalora. Aksolotlojn havas kulturan rolon, do protekti ilin gravas, sed plibonigi la kondiĉojn por la aksolotlo ankaŭ plibonigas la kondiĉojn por aliaj organismoj, kiuj

vivas en la lago, inkluzive homojn. Nur per kunlaboro, peno kaj kompreno, tiu batalo estas venkebla.

Fonto: <https://scivolemo.wordpress.com/2018/10/03/la-salamandro-kiu-neniam-igas-plenkreska/>

Lina kaj la donaco

Kiel komenciĝis tiu ĉi historio? Daniel ne bone memoris, sed de tempo al tempo li provis rememori ĝin, eĉ la plej etajn detalojn, ligitajn al ĝi kaj iam-iam eble sukcese. Li havis la senton, ke tiam la tago estis printempa aŭ en la komenco de la somero. Odoris je florantaj tilioj aŭ eble Lina odoris tiel. Sur la blanka muro de la ĉambro ludis ombroj, similaj al saltantaj leporoj aŭ estis sunradioj, kiuj kvazaŭ kisis la muron. Estis silente. Ordinare en la ĉambro ĉiam regis silento. Li malofte aŭskultis radion kaj ne havis televidilon. Kial mi bezonas televidilon – demandis li sin mem – mia animo estas televidilo. En ĝi estas tiom da historioj kaj okazintaĵoj. Ofte li rememoris ilin. Li kvazaŭ trafolumis kaj rigardis ilin kiel sur televidila ekrano. Sufiĉis, ke li alrigardu al sia animo kaj la okazintaĵoj en lia vivo komencis aperi unu post la alia. Luj estis ridindaj, alia – ne, sed preskaŭ ĉiuj estis amuzaj. Iu el tiuj ĉi okazintaĵoj estis Lina.

Ŝi aperis en lia vivo antaŭ kelkaj jaroj kaj nerimarkeble iĝis parto el ĝi. Lina kutime venis al li ĉiun tagon posttagmeze, post la fino de la labortago. Ŝi eniris en lian ĉambron, lasis sian virinan sakon sur la seĝon, kiu estis ĉe la pordo, demetis sian blankan jakon kaj sidiĝis en la fotelon ĉe la fenestro. Lina rakontis kiel pasis la labortago. Daniel ŝatis aŭskulti ŝin. Pli ĝuste li ŝatis aŭskulti ŝian molan voĉon, kiu similis al sususro de verdaj arbofolioj. Ŝi parolis mallaŭte kaj de tempo al tempo li streĉis orelojn por percepti bone ĉiun ŝian vorton.

Lina laboris en granda fremdlanda entrepreno. Ŝi estis tri jarojn pli juna ol li. Daniel amis ĉiun belan en la vivo kaj Lina havis okulojn, similajn al maturaj vinberoj. Ŝia rideto estis kiel mara sunsubiro. Lin allogis ne nur ŝiaj okuloj, sed ŝia talento aŭskulti lin, kiam li rakontis ion al ŝi. Ŝi aŭskultis kaj rigardis lin kiel infano rigardas sian patrinon kaj atentis pri ĉiuj ŝiaj vortoj.

Daniel rakontis al Lina diversajn historiojn. Luj el ili vere okazis, aliajn li tralegis ie kaj triajn – li elpensis, sed Lina kredis, ke ĉio, kion Daniel rakontas al ŝi, iam vere okazis. Ŝi neniam interrompis lin kaj ne starigis al li superflujajn demandojn.

Daniel amis ŝin. Li ne konis alian knabinon kiel ŝin, eĉ li opiniis, ke simila knabino ne ekzistas. Lina renversis ĉiujn liajn antaŭajn imagojn pri la knabino kaj li jam sciis, ke ŝi ĉiam estos kun li.

Fojfoje li provis rememori de kiam li konas ŝin, ĉu de iu fora printempo aŭ de la komenco de iu somero, sed li neniam sukcesis precize rememori tion. Tamen

verkis kaj sendis Julian Modest, el Bulgario

ne gravis, pli gravis, ke ili estas kune.

Foje vespere en la komenco de la aŭtuno, kiam ekstere la arbofolioj falis kiel pezaj elspiroj, Daniel ĉirkaŭbrakis Linan kaj tenere flustris al ŝi:

- Mi deziras, ke ni geedziĝu kaj mi faru al vi donacon.

- Kian donacon? – demandis ŝi ridete kaj ŝiaj okuloj, kiuj similis al maturaj vinberoj, kvazaŭ ekbriletis, lavitaj de frumatena roso.

- Bebon – respondis Daniel.

- Tiun ĉi donacon mi ĝoje akceptos – diris Lina kaj ŝiaj vangoj iom ruĝiĝis.

Ili eksilentis. En la ĉambro regis duonlumo, kiu kvazaŭ kovris ilin kiel mola litkovrilo kaj ili kuŝis senmovaj.

- Ankaŭ mi havas donacon por vi – diris mallaŭte Lina.

- Kian? – demandis Daniel.

- Oni proponis al mi oficon en la ĉefurbo. Ni ekveturos kune. Ni loĝos tie, mi ricevos grandan salajron.

Daniel silentis.

- Kion vi diros? – demandis ŝi iom embarasita, ĉar lia silento ŝajnis suspektinda.

- Mi ne deziras tian donacon – respondis Daniel.

- Kial? – demandis Lina kaj en ŝia voĉo sentebliis ofendo kaj senreviĝo. – Kial vi ne deziras mian donacon?

- Kion mi faros en la ĉefurbo? – diris Daniel.

- Ni havos tie grandan domon. Niaj infanoj lernos en elitaj lernejoj kaj poste ili studos en la universitato. Se ni restos loĝi ĉi tie, en nia eta urbo, ni ne povus vivi kun tiom malmulte da mono. Via salajro estas mizera kaj ridinda.

- Neniam ĝis nun vi menciis, ke mia salajro estas ridinda – diris Daniel.

- Jes, ĉar neniam ĝis nun vi diris, ke vi deziras fari al mi donacon – bebon. Se vi donacos al mi bebon – ni bezonos pli da mono, por ke ni povu zorgi pri nia infano aŭ pri niaj infanoj.

Daniel nenion plu diris. Li silentis, aŭskultante la susuron de la arbofolioj, kiuj ekstere falis de la arboj.

Lina forveturis al la ĉefurbo kaj de tempo al tempo Daniel provis rememori kiam komenciĝis tiu ĉi historio.

verkis kaj sendis **Julian Modest**, el Bulgario



Ponto super la rivero

Estis granda kaj larĝa rivero. Ambaŭflanke vivis homoj, kiuj parolis diversajn lingvojn. Se ili deziris komuniki unu kun la alia, ili iris al la bordo de la riverego kaj helpe de interpretistoj kriegadis trans la riveron.

Ĝi estis tre laciga kaj krome la interpretistoj ne laboris senpage. Por ĉiu vorto oni devis pagi multe da mono. Tio ĉi ege elsuĉis la enhavon de la monujoj. Ofte la interpretistoj mistradukis iliajn vortojn kaj frazojn kaŭzante grandan domaĝon.

Ĉiu sentis, oni devas fari ion por elimini tiun ĉi teruran situacion.

En iu tago nekonata viro alvenis kaj li ĵuris al la ĉielo, ke li povas konstrui ponton super la riveregon kaj kiu trairos ĝin, tiu dume ellernos la lingvon de la transaj homoj.

La homoj ĝojegis kaj benis la fremdulon.

Komence ĉio ŝajnis simpla afero. Konstruiĝos ponto kaj ilia problemo solviĝos.

Ili ne bezonos plu interpretistojn. Ili senĝene povos komuniki kun la transflankaj homoj.

Pro tio erupciis konflikto. La interpretistoj ekribelis kaj ili komencis protesti:

— La ponto estas danĝera. Ĝi solvos nenion. Se oni iros tra la ponto estos lingvokonfuzo. Neniu komprenos unu la alian. La plej bona metodo estas la helpo de la interpretistoj. Ne permesu konstrui la ponton!

La homoj ne sciis, kion fari? Estiĝis du tendaroj. La

verkis Apáti Kovács Béla, el Hungario

unu deziris, ke la ponto estu konstruita, la alia estis kontraŭ la ponto.

— Ni ne volas ponton — kriegadis la kontraŭantoj.

— Ni volas ponton — diris la apogantoj. Ili diskutadis tage kaj nokte. La fremdulo malgaje rigardis kaj aŭskultis ilin.

Pleje la interpretistoj estis kontraŭ la ponto.

— Ankoraŭ ne alvenis la tempo por konstrui tian ponton — diradis la interpretistoj. — Eble post cent aŭ ducent jaroj, sed nun ne. Ni helpas al vi komuniki kaj ĝi estas la plej bona ilo por komprenigi vin kun la transaj homoj.

La fremdulo malgajiĝis vidante la fiaskon. Dum la homoj diskutis, li nerimakleble forlasis la bordon de la rivero.

Matene li mankis al neniu. La interpretistoj ĝojegis kaj feliĉe kriegadis: „Ni venkis. Venkis la racieco. Kial konstrui ponton, se ni povas traduki la transan lingvon. La konstruo estus vana laboro kaj eble ĝi solvus nenion.”

Ankaŭ en la estonto ankoraŭ longe la homoj staris sur la bordo de la riverego kaj ili kriegadis transan bordon kaj reen helpe de interpretistoj, kiuj estis tre kontentaj. De tago al tago ilia monujo dikiĝis, ĉar la scio de fremda lingvo ne estas senpaga.

verkis **Apáti Kovács Béla**, el Hungario



La legendo pri la Ratkaptisto

En la jaro 1284 venis al Hameleno stranga viro. Li estis vestita per jako el multkolora drapo. Li nomis sin ratkaptisto, ĉar li promesis kontraŭ certa monsumo liberigi la urbon de ĉiuj musoj kaj ratoj. La burĝoj konsentis kaj promesis al li tian rekompencan. La ratkaptisto elpoŝigis fajfileton kaj ekfajfis.



Tuj poste elrampis el ĉiuj domoj la ratoj kaj musoj kaj kolektiĝis ĉirkaŭ la fajfanto. Kiam li nun opiniis, ke neniu rato postrestis, li iris

elurben en la riveron "Vezero". La tuta rataro sekvis lin, falegis en la riveron kaj dronis.

Sed post kiam la burĝoj estis liberigitaj de sia turmenta zorgo, ili pentis la promesitan rekompencan,

-- el blogo Esperanta Retradio

kaj ili rifuzis al la viro la monon. Kolere li forlasis la urbon.

Sed la 26-an de junio li revenis, nun en la formo de ĉasisto, kun teruriga vizaĝo, kun stranga ruĝa ĉapo, kaj denove sonorigis sian fajfileton en la stratetoj. Tuj venis ĉi-foje ne ratoj kaj musoj, sed infanoj, knaboj kaj knabinoj, ekde la kvara vivjaro, grandamase. Ĉiam ludante li kondukis ilin eksteren en monton, kie li malaperis kun ili.

Nur du infanoj revenis en la urbon, ĉar ili malfruiĝis; sed unu el ili estis blinda, kaj pro tio ne povis montri la lokon, la alia estis muta kaj ne povis rakonti. Unu knabeto estis reiranta por preni sian jakon kaj tiel eskapis el la pereco.

Kelkaj personoj diris, ke la infanoj estis kondukitaj en groton kaj denove elvenis en Transilvanio. Entute cent tridek infanoj estis perditaj. (Laŭ la fratoj Grimm, "Germanaj legendoj")

La mistero „Ratkaptista legendo“ famigis la urbon en la tuta mondo. Eĉ en Azio kaj en Ameriko oni konas la Ratkaptiston.

>> 32

Facilaj rakontoj

Preĝejo el fromaĝo

Antaŭ longa tempo la ciganoj havis propran preĝejon, belan, el griza ŝtono kaj la serboj havis preĝejon el fromaĝo.

Serbo vizitis ciganan ĉefon: „Kial ni ne interŝanĝu niajn preĝejojn?“

"Sed estus interŝanĝo malbona por ni ciganoj. Ni ne volas fordoni nian ŝtonan preĝejon por ricevi preĝejon nur el fromaĝo!"

"Sed ni povas doni monon, multan monon, kompanse pro la malpli alta valoro de nia fromaĝa preĝejo."

Aŭdinte la vorton mono, la cigano estis preta negoci. La serbo ion marĉandis, sed finfine ili interkonsentis pri la kompenso. La serbo kolektis multan monon, sed ankoraŭ mankis tridek dinaroj. Sed la cigana ĉefo konsentis, ke, ĉar ne estas granda sumo, la ciganoj povos iomete atendi ĝin.

Do, la serboj alproprigis al si la belan, ŝtonan preĝejon de la ciganoj kaj la ciganoj iris al fromaĝa preĝejo.

Kiam ciganoj staris tie kaj ĉirkaŭrigardis, unu malsata cigano derompis peceton da fromaĝo kaj komencis manĝi ĝin. La aliaj tre koleris kaj komencis tiri kaj bati lin.

"Ne... Ne... Fratoj! Kiel ataki min? Mi prenis nur peceton por gustumi!" kaj li proponis pecetojn al aliaj.

Kiam la ciganoj gustumis la fromaĝon, ĝi gustis tiel bonege, ke ili ĉiuj rompis pecojn, rompadis... kaj post la tempo bezonata por kunfrapi la manojn – la preĝejo malestis!

Manĝinte sian preĝejon, la ciganoj ne sciis, kie preĝi. Ili iris al serboj: „Donu al ni la restantan monon.“ Sed la serboj ne havis ĝin.

Tial la serba ĉefo sugestis: "Ni interkonsentu: ni ne havas monon kaj vi ne havas preĝejon. Vi rajtas preĝi en nia preĝejo, ĝis ni pagos la lastajn dinarojn."

sendis Jindřiška Drahotová, el Ĉeĥio

Sed ankoraŭ nun la serboj neniam pagis sian ŝuldon. Tial la ciganoj ankoraŭ rajtas preĝi en serbaj preĝejoj... kaj la ciganinoj almozpeti de domo al domo!



El libro "Faktoj kaj fantazioj" de Marjorie Boulton, komisiita de UEA por tiuj, kiuj apartenas al la kategorio progresantoj, kvankam ne eblas difini tiun kategorion kun zoologia precizeco.

Noto: Ciganoj ne ŝatas la vorton "cigano". Laŭ NOVA PIV la vorto "romao" estas konsilinda. Tamen ĉarma romaino ne sonas tiel bele kiel ĉarma ciganino precipe en kantoj. Ciganoj certe mem solvos sian propran nomon en Esperanto kaj ni akceptos ĝin.

La 12-a MONA Kunveno



Kelkaj pensas, ke UEA estas nederlanda hipopotamo (cetere, malofita kaj estingiĝanta besto-speco), sed en la realo ĝi estas gazelo

kuranta en la dezertoj de Irano. Kunkuru, membriĝu, donacu, sed ĉefe informu pri Esperanto kaj instruu ĝin. Ĉio cetera estas fest-paroladoj. Malfermiĝas la aliĝoj al la 12-a Mezorianta Kunveno en Irano. Legu ĉiujn informojn en :

https://uea.org/vikio/La_dek-dua_Mezorienta_Kunveno_en_Irano

Komisiono MONA

31 >>

Ekzakte antaŭ 730 jaroj la fajfisto albuŝigis la fluton, ekludis kaj la infanoj forlasis la urbon. Preskaŭ samlonge volviĝas klarigaj klopodoj ĉirkaŭ la Ratkaptista legendo.

Kial kaj kien la infanoj iris, eĉ sciencistoj ne povas diri. Ĉu estis nur elmigrado de junaj hamelenanoj, ĉu temis pri la pesto aŭ ĉu eĉ estis infana kruca militiro? Ĉu la Ratkaptisto nur estis la propeka kapro aŭ magia vagabondo? Pri kiu versio oni decidu, ĉiu elektu mem. La spuro de la infanoj perdiĝas ĝis nun en la densaĵo de la historio.

verkis **Jarka Malá**, el Ĉeĥio

Fonto: <https://esperantaretradio.blogspot.com/2018/07/la-legendo-pri-la-ratkaptisto.html?view=flipcard>

Solvo de la krucvortenigmo

	O	L	K	O	N
U	L	N	E	L	V
L	V		D	E	S
K	K	A		K	E
N	O	G	N	A	S
U	T	E	R	P	

